
# LA JUNA PENSO

ISSN.0337.5036
duobla n-ro 127-128
Dec.78-Mar.1979

## ORGANO DE LA JUNULFAKO DE SAT



## UNIKA !


John Rapley nerimarkite fotita en sia hejmo de niaj lertaj kunlaborantoj. La OKK-Prezidanto ĵus finverkis la elstaran sed sekretan tekston. (La tekston vi legu en p. 3.)

Jen nia mirinda kaj unika dokumento.

(Filmo Ilfrod 5HP.Obj Soligro T2 800 mm. f: 64, 1/15 s.)

LA KONGRESEJO

Tiun plaĉan desegnaĵon arte faris por vi unu el niaj multaj plej lertaj desegnistoj. Dank'al granda precizeco de la detaloj facile rekoneblaj estas la akceptejo, la kunvenĉambroj kaj la dormĉambroj. Sur tiu mirinda bildo bone videblas ankaŭ parko el la ĉirkaŭa parto. (Necesis nur iom pli ol 2oo tunoj da benzino por la helikoptero.)



**LA JUNA PENSO** DUMONATA ESPERANTO-GAZETO

67 AV. GAMBETTA, F 75020 PARIS PĈK: LA SOURCE 34 268 70 Z. PREZO 4 FF

Duobla prezo 2x4=8 FF

ABONTABELO

# PERANTOJ

(Ŝparu tempon kaj (propran) energion! N.D.L. Desegnanto

| Lando | nura gazeta serio | gazeta+ broŝura serioj | | |
|---|---|---|---|---|
| Belgio | 210 | 420 | BF | Katja Lödör, Brusselsesteenweg 385, B-9219 Gentbrugge, pĉk 000-0591594-88. |
| Britio | 2,40 | 4,80 | p. | Christopher Long, 85 Point Royal, Rectory Lane BRACKNELL; Berkshire. |
| Danio | 33,50 | 67,00 | kr. | Uwe Lhose, Chr.h. Voldgade 51,2, 1424 København K, pĉk 5.14.41.16. |
| Finlando | 20 | 40 | mk. | S.P. Hurtta P/a FEL, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, pĝk KU 152801-5. |
| Francio | 25 | 50 | FF | rekte la centro: La Juna Penso, 67, avenue Gambetta F 75020 Paris, Pĉk La Source 34 268,70 Z |
| Germanio | 16,50 | 33,00 | mk. | A. Stephan, Carmenstrasse 5, D-4000 DÜSSELDORF 11. pĉk Essen 9168. |
| Hispanio | 200 | 400 | pes. | Josê Bernabeu, Gral. Primo Rivera 6, Callosa de Segura. |
| Hungario | - | - | - | Béla Kovaĉs, H-8741-ZALAAPÂti, Deâk F. u. 68 |
| Italio | 2600 | 5200 | l. | Ildo Conti, via R. Sanzio 15, 14100 ASTI. |
| Izraelio | 12,60 | 25,20 | l. | Ch. Hocchauser-Armony, PO Box 5171, Haifa. |
| Japanio | 1400 | 2800 | y. | Mine Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, Takasago hyogo-ken 671-01, pĉk Kobe 72148. |
| Jugoslavio | 21 | 42 | d. | Zijo Ajdinoviĉ Jovana Cvijića 16/1, 71000 SARAJEVO |
| Kanado kaj Nordameriko | 6,30 | 12,60 | dol | rekte al la centro en Parizo. |
| Nederlando | 14.50 | 29,00 | gld | Bert de Wit, Leidsevaart 52, NL 2114 AD Vogelenzang, pĉk 270 31 31. |
| Portugalio | 105 | 210 | esk | Paulo Branco, rua Filarmónica 23, Vestiaria, Alcobaca. |
| Svedio | 23 | 46 | kr. | Inga Johansson, Skeppargången 20 II, S-41318 Götebor |
| Svisio | 16,50 | 33,00 | SF | provizore rekte la centron kontaktu. |
| Aliaj pagipovaj | 25 | 50 | FF | aŭ egalvaloro al unu el la ĉi supraj perantoj aŭ rekte al la centro en Parizo. |
| Nepagipovaj | 12 | 24 | IRK | aŭ kontaktu la centron. |

Petas anstataŭon la perantoj por Nederlando, Svisio. Kiu bonvolas transpreni ties taskon, tiu kontaktu ilin aŭ skribu al la LJP-prizorgantaro en Parizo. Perantoj estas plu serĉataj por Aŭstralio kaj Oceanio, Irano, Pollando, Venezuelo, Sudameriko, Kanado kaj Nordameriko.

La verkantoj mem respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La manuskriptoj alvenu prefere tajpitaj aŭ, minimume, legeble skribitaj. Ili ne estas resenditaj de la redakcio. Ankaŭ desegnaĵojn kaj/aŭ humoraĵojn ktp... ni akceptas por aperigo. Adresŝanĝoj: bonvolu memorigi la malnovan adreson por serĉado en la sliparoj.Dankon

ALIĜU AL SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA! Petu aliĝdeklaron, ekstrakton el la statuto, komentojn, ĉe SAT, 67, avenue Gambetta, F 75020, Paris.

SAT-JUNULFAKO Sekretario: J.-P. Lévy, 37, rês de la Madeleine, F 78460, Chevreuse JF-Komitato: A.-S. Lévy, J.-P. Lévy, V. Ternant. Kasistino: M.-C. Lévy, pĉk La Source 35 420.09 A. Cirkulantaj Leteroj: Lilia Ledon, Caixa postal 18248,01000 SÃO PAULO/SP, BRAZILIO. Junulara Angulo en Sennaciulo: Loes Demmendaal, Bethlehemstraat 23E, NL 3061 GA Rotterdam. JF-perantoj: Alzaco (F 67-68): J. Lépeix; Bavario (Germanio): Jomo Ipfelkofer; Belgio: Guy Vanderputten; Bretonio (F): Patrick Chevin; Britio: Neil Bottomley; Ĝerso (F 32): L. Despaux; Hérault, Vaucluse, Gard (F 34-84-30): J.-C. Lang; Hungario: Kovács Béla; Katalunio: Oscar Puig; Nederlando: C. Grabandt; Norda regiono de Francio: Sigrid Bouchez; Pollando: D. Matray; Rzeszów (Pollando): S. Winiarz; Tokio (Japanio): Tosio Tezuka.

La venontaj LJP-numeroj estos redaktitaj laŭvice de diversaj gekamaradoj. Tiel malpeziĝos la laboro de la JFK, kiu ĝis nun ankaŭ zorgis pri LJP-eldonado. Kandidatoj por LJP-redaktado bonvolu sin anonci al la JFK en Chevreuse (Vd supre)

# VIVO DE LA S.A.T.-JUNULFAKO

Béla Kovács, JF-peranto en Hungario sendis al la orienteŭropaj SAT-gejunuloj la sekvantan leteron:

"En la nomo de SAT-Junulfako, ni kunvokas Vin por kunlabori en la Rondo de Orienteŭropaj SAT-Gejunuloj.

"La celo de nia kunlaboro estas, ke ankaŭ sur tiu ĉi tereno la junaj SAT-anoj havu konstantan kontakton unu kun la alia kaj intensive alkroĉiĝu al la laboro →

---

# SWANWICK ALVOKAS VIN!

En konferenca centro "The Hayes" (Hejs) apud urbeto Swanwick (Ŝuonik) kiu situas en la graflando Derbyshire (Dabiŝir) okazos la 52-a SAT-KONGRESO de Esperanto de la 13-a ĝis la 20-a de julio 1979.

La konferencejo, ĉirkaŭata de sia propra granda parko, situas nur 10 kilometrojn de la montoĉeno Pennines (Penajns) ĉe kies suda finaĵo troviĝas la tre alloga Peak District (Pik Distrikt) fama ekskurso- kaj ferio-celo de la Britoj.

350 (ne unu plia!) kongresanoj povas dormi, manĝi, konferenci, ludi kaj naĝi en kaj ekster The Hayes. La plimulto de la dormoĉambroj estas unulitaj; estas kelkaj dulitaj kaj tri/kvarlitaj por familioj. Je via dispono troviĝas ludtereno, subĉiela naĝejo kaj tabloteniso.

La INKLUZIVA KOSTO de loĝado, manĝoj, trinkaĵoj (ne alkoholaĵoj, kiuj estas aparte aĉeteblaj) kaj ekskurso al Stoke-on-Trent: £ 36.

OKK Adreso: 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB, Britio.

| ALIĜKOTIZO | (en £) |
|---|---|
| SAT-ano | 7,00 |
| SAT-geedzoj | 11,00 |
| Gasto | 9,00 |
| Gast-geedzoj | 13,00 |
| SAT-junuloj(15-25j.) | 5,00 |
| Gast-junulo | 7,00 |
| Subtenanto | 3,00 |
| Infano(malpli ol 15j.) | ...nenia kotizo |

Jam anonciĝis (ĝis 31.3.1979) pli ol 230 partoprenontoj. Rapidu se vi ne volas esti la 351-a!

---

## SWANWICK ALLOGAS VIN

La mondfamaj ĵurnalistoj de La Juna Penso post streĉaj klopodoj sukcesis ruze trompŝtelspione kopii la provizoran kongresan programon inter la momento kiam la prezidanto de la OKK - John Rapley - finverkis ĝin kaj tiu, kiam li metis ĝin sub sian dekstran kubuton.

Jen -- ekskluzive por la legantoj de LJP -- la enhavo de tiu sekreta, eble modifota, sed tamen leginda teksto:

Vendredon alveno de la kongresanoj. Vespere: esperanta filmo pri NovZelando

Sabaton ptm: renkonto kun E-interesatoj, TANEF-kunveno. Vespere: Solena Malfermo kaj fanfara prezento

Dimanĉon atm: Unua Laborkunsido; ptm: prelego de D-ro J C Wells (Londona Universitato Fonetika Departamento) "Kial ne la Angla", Packunveno, Junulfaka Kunsido; vespere: "Brita Popolvespero" -- inkluzive de popoldancado en kiu la kongresanoj povos partopreni.

Lundon atm: 2-a Laborkunsido; ptm: eskurso mallonga (laŭ elekto - listoj por subskribi en la kongresejo)

Mardon atm: 3-a Laborkunsido; ptm: ekskurso mallonga; vespere: prelego de Petro Louis "La Astroj kaj Ni"

Merkredon tutkongresa ekskurso al Stoke-on-Trent

Ĵaŭdon atm: prelego de Prof. Ralph Lewin (instruas maran botanikon kaj Esperanton en la Universitato de Kalifornio) "La verdiĝo de Ursoj" - scienca studo pri ĉi tiu fenomeno; ptm: ekskurso mallonga; vespere: diskuto "La signifo de Lanti por Esperanto" - enkonduko de N Bartelmes (Estos la centjara datreveno de la naskiĝo de Lanti)

---

Krome okazos Liberecana, Kvakera (kaj eble aliaj laŭ petoj) kunvenoj.

de SAT.

"Se Vi volas kunlabori kun ni, tiam bonvolu plenigi la malsupran demandfolion, kaj resendi al la sekva adreso: Kovács Béla, Zalaapáti, Deák F.u. 68,H 8741 Hungario.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Mi aliĝas al la Rondo de la Orienteŭropaj SAT-Gejunuloj
Nomo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .Naskiĝjaro . . . . . .
Adreso. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -"

La ~~JFK invitas la Orienteŭropaj SAT-Gejunuloj~~ respondi amase al la Hungara peranto, aldonante eventualajn sugestojn de formoj de loka agado. Ne nepre atendu la inviton en persona letero!

Ni kuraĝigas ĉiujn JF-anojn en iliaj agademo kaj iniciatemo.

La perspektivoj en Orienteŭropo (vidu la raporton de Anne-Sophie pri ŝia vojaĝo en Pollandon fine de la lastjara somero) konkretiĝas. PSEK de SAPS invitis reprezentanton de la JF partopreni la de ĝi organizitan seminarion "Esperanto serve al la junularo". En la tagordo estis granda loko por prezento de la SAT-JF al la Polaj E-istaj studentoj. Okazis inter SAT-JF kaj PSEK interparoloj pri kiuj komuniko aperas en lasta paĝo de tiu-ĉi LJP.


Jean-Claude Lang, JF-peranto por Hérault Vaucluse Gard, partoprenis la 34-an Kongreson de SAT-Amikaro (14-17 aprilo 1979). "150 kongresanoj el 8 landoj partoprenis la Kongreson inter kiuj multaj junuloj." Li antaŭvidis du ekspoziciojn en sia departemento komence de junio kaj esperas ke li baldaŭ povos sendi al ni bonajn novaĵojn kaj eble varbi lernantojn.

Nia tre aktiva k-dino Lépeix, JF-peranto en Alzaco, longe raportas pri (ne nur) la vivo de la JF en sia regiono. La raporto legeblas en paĝo 5 de tiu ĉi numero.

Sekve de la kontaktoj okazintaj inter la SAT-JF kaj junularaj E-o organizaĵoj, reprezentantoj de TEJO kaj de PSEK estis invitataj partopreni la SAT-Kongreson en Swanwick. Ni esperas ke tiel eblos pliprofundigi la rilatojn por kuna laborado por komunaj celoj surbaze de reciproka kono kaj respekto de respektiva identeco.

JFK, julio 1979.

===============================================================




Respondojn
demandojn
reagojn
oni sendu al la redakcio:

LA JUNA PENSO
67 avenue Gambetta
F 75020 PARIS

8) Ĉu SAT ofte eldonas librojn pri fundamentaj sciencoj?

11) Kion faras la estraro de SAT por disvastigi la ideojn de la movado en Orientaj Eŭropaj landoj? Ĉu ili provas konatiĝi kun la lokaj gvidantoj?

R. SAT-estraro en tiuĉi senco ja ne ekzistas, laboras oficeje sekretarioj kaj organizade la organoj. Do, ni estas tute demokrata asocio kultura, kiu uzas la neŭtralan lingvon ESPERANTO por havigi interkomprenantajn kontaktojn de membro al membro, de membro al iu Esperantisto ktp.

Sur tiuĉi vojo SAT disvastigas kaj -is jam tuj post la kruela dua mondmilito siajn ideojn en ĉiu lando de l'mondo, do, ankaŭ en mez- kaj orienteŭropo.

La membro (estas la membraro), do, la SAT-ano, ĉu vira aŭ ina, konatiĝas daŭre persone, grupe aŭ alie kun SAT-anoj ĉie. La SAT-anaro, kiu enkludas la organojn k la oficejan centron en Parizo, estas aktiva!

Oni ne forgesu la jarajn kongresojn, kiujn ja ankaŭ vizitas SAT-anoj k Esperantistoj mez- k orienteŭropaj.

Alberto

12) Ĉu oni povas imagi, ke en la venontaj jaroj okazos SAT-Kongreso en mezeŭropa lando?

R. Mi povas imagi, ke en iu de l'venontaj jaroj okazos SAT-kongreso en mez- aŭ

PRI SAT-JUNULFAKO EN ALZACO

I Agadraporto

Mi diru tuj, ke la Junulfako de SAT en Alzaco havas unu membron: min. Tio estas la situacio de nia fako en preskaŭ ĉiuj urboj, kie ĝi havas reprezentanton. Oni devas konsideri la aferon laŭ la logika ordo. Por ke estu junaj SAT-anoj, devas antaŭe esti

1. personoj, kiuj scias, kio estas Esperanto
2. poste, Esperanto-lernantoj
3. poste, esperantistoj, kiuj interesiĝas pri SAT.

1. propagando por Esperanto

Mi povas honeste aserti, ke, ek de mia alveno en Alzaco, pli da homoj scias pri Esperanto:

- Antaŭ mia aliĝo al Amnestio Internacia, liberiĝis la bulgara politika malliberulo, kiun mia grupo estis adoptinta. Pluraj grupanoj sendis al tiu homo gratulkartojn pri lia liberiĝo. Post mia aliĝo, unu ricevis respondon, kaj li diris al la grupo: "Mi ne komprenas, kial la karto estas en la rumana, ĉar nia adoptito ja estas bulgara",kaj li rondirigis la karton, por ke la grupo solvu tiun misteron. Rigardinte la karton, mi klarigis "ĝi estas en Esperanto", kaj ĝin tradukis. Do nun mia grupo scias, ke Esperanto plu vivas, almenaŭ ĉe bulgaraj disidentoj, kaj ke la ĉeesto de esperantistoj ĉe AI povas utili al ĝia agado.
- Por kompreni, kiel Esperanto estas konsiderata en la ekologia-kontraŭmilitisma-etnisma-kajtielplua medio, kie mi aktivas, necesas scii, kiel tiu medio estas strukturita. Aktivanto de tiu medio apartenas al 3 aŭ 4 grupetoj, kaj en ĉiu el tiuj grupetoj ĉiu individuo mem apartenas al 3 aŭ 4 grupetoj. La nura strukturo, kiu ligas la movadon, estas la reto de personaj kontaktoj kaj amikeco. La sama homo ne povas aparteni al la multegaj grupoj, kiuj faras ion en Alzaco, sed kutime ĉiu scias sufiĉe precize, kiu zorgas pri kio en nia regiono. Do oni scias en la movado, ke Ĵaklino zorgas pri rifuzo de porarmea imposto, korespondado kun gemalliberuloj, kaj Esperanto. Kutime, oni diras al mi: "Mi lernus Esperanton, se miaj aktivadoj ne jam forprenus tiom de mia tempo." La diferenco kun aliaj medioj estas, ke tiu respondo estas sincera, kaj ke oni konsideras Esperanton kiel respektindan aktivadon. Alzacaj aktivantoj estas iom pli konsciaj ol francaj pri la mondeco de problemoj, kiujn ili volas solvi, tial opinias bona ĉion, kio povas unuigi popolojn. Aliflanke, miaj gekamaradoj aŭdis ek de sia infanaĝo tiom da antaŭjuĝoj pri sia propra gepatra lingvo, ke ĝi estas mortinta, ke ĝi ne havas kulturon, ke ĝi ne taŭgas por ĉion esprimi, ktp, ktp, ke antaŭjuĝojn pri alies lingvo ili ne esprimas. La situacion mi povas klarigi per jena anekdoto: →

---

Ni volas scii pri SAT!... (daŭrigo)

orienteŭropa lando. Estus tre interesa (preskaŭ) jubilea kongreso, la 60a SAT-kongreso en 1981 eble en Leningrado aŭ Lejpcigo aŭ Prago aŭ ie. La unua SAT-kongreso (1921) estis en Prago! Aŭ ĉu en Budapesto? Ĉu tie ni kongresigos 1981? Ni laboru al tiuĉi celo, certe ni havos sukceson. Ni jam nun pripensu la paŝojn sur la vojo al tiuĉi kongreso.

Alberto

13) Kian starpunkton SAT elektis en la Ĉina-Vjetnama milito?

14) Oftege mi povis konstati, ke esperantistoj ne volas aliĝi al SAT, ĉar ili kredas, ke SAT estas sennaciista asocio, kaj ili mem ne estas tiaj.

Tiu punkto ŝajnas al mi tre kontraŭdira, ĉar:

- mi mem aliĝis al SAT leginte la statuton, kiu tiel difinas SAT "SAT... celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj ... (SAT) per libera diskutado celas malebligi ĉe membroj la dogmigon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj"
- en la kadro de SAT, dum debatoj, mi plurfoje aŭdis la argumenton "ni ne povas akcepti tion, ĉar tio kontraŭdiras la sennaciismon, kiu estas la bazo de nia asocio"
- mi ĵus ricevis franclingvan propagandilon de SAT-Amikaro kun titolo "Esperanto; SAT; SAT-Amikaro", kie mi legas ke SAT (mi tradukas el la franca) estas tutmonda asocio kun karaktero sennaciista.

Mi deziras do scii, kia estas la situacio de sennaciismo en la kadro de SAT.

Iam kaprinbredisto venis el Okcitanio por viziti amikon mian, kiu ĵus liberiĝis post dujara puno pro armerifuzo. Tiu kaprinbredisto diris interalie, ke li interesiĝas pri Esperanto. Reago: "Ho jes, Esperanton ni havas ankaŭ ĉe ni, pri tio zorgas Ĵaklino". Dum la jaro, mi tradukis el la franca broŝuron pri la atomcentraloj de Fessenheim kaj Wyhl, kiu aperis kiel suplemento de Ionix, la ĉefa kontraŭatoma gazeto de la regiono. Mi sendis ekzempleron de tiu broŝuro en Esperanto al la redakcio de Ionix, kaj aperis en la gazeto anonceto pri la traduko, kun la kompleta titolo en Esperanto. Poste, bulgaraj esperantistaj ekologiistoj petis de mi artikolon pri la luktoj por protekto de Rejno; ĉar mi ne sentis min sufiĉe kompetenta, mi petis informojn de amiko, kaj li respondis al mi, ke mian leteron li transsendis al la sekretario de la kontraŭatoma grupo, kiu sendos al mi artikolon pri tio.

2. Esperanto-kurso

Mi instruas Esperanton de du jaroj, sed ĉi-jare mi metis mian kurson en la kadron de asocio de mia kvartalo. La rezulto estis sama: pasintjare mi havis du gelernantojn, ĉi-jare mi havas du lernantinojn. Tamen la aktivantoj de la kvartala asocio diris al mi, ke mi ne malkuraĝiĝu, ĉar ili mem ekscíis pri Esperanto pro la kreado de tiu kurso, ili parolis pri tio al aliaj personoj, kaj lokaj ĵurnalistoj informis pri la kurso.

Do, mi havas du lernantinojn, unu liceaninon, kaj unu instruistinon, kiu lernas ankaŭ per la perkoresponda kurso de SAT-Amikaro. Ni certe finos la junulkurson antaŭ la somerferioj.

Ĉar mi restos en Strasburgo almenaŭ ĝis septembro 1980, mi antaŭvidas:

- rekomenci mian kurson por komencantoj,
- krei konversacian kurson, kie jamaj esperantistoj aŭ progresintaj lernantoj povos praktiki Esperanton dialogante pri temoj, kiuj ilin interesos.

Krom miaj kvar gelernantoj, estas en la urbo pluraj junuloj, kiuj lernis per la perkoresponda kurso organizata de la loka grupo de Unuiĝo Franca por Esperanto kaj junaj esperantistoj el aliaj regionoj, kiuj nun studas ĉe nia universitato. Estus bone, se tiuj personoj povus kunveni por interkonatiĝi kaj praktiki la lingvon. Ĉe la ĝenerala asembleo de la kvartala asocio, oni diris al mi, ke eblos organizi renkontojn en la asociejo. Eble ni povos inviti esperantistojn el aliaj regionoj: ĉar proksimaj regionoj situas en aliaj ŝtatoj, tiaj renkontoj estas stimulaj por la lernantoj.

3. Esperanto-medio

Estas en Strasburgo du SAT-anoj: mi kaj novaliĝinto, kiu ne estas junulfakano. Nia nova kamarado instruas Esperanton en sia liceo en Obernai. Liaj gelernantoj estas nun tro junaj por interesiĝi pri SAT. Ankaŭ en Sélestat kaj Munster estas kursoj de Esperanto en liceoj, kun lernantoj iom pli aĝaj. Statistike, parto de tiuj esperantistaj geknaboj kaj gejunuloj devus esti en Strasburgo post kelkaj jaroj, ĉu por lerni, ĉu por labori. Tial mi ŝatus organizi ion daŭran en Strasburgo, atendante la alvenon de tiu nova generacio.

Jam ekzistas en Strasburgo grupo de UFE, kie oni povas renkonti afablajn pensiulojn. Ĝi organizas perkorespondan kurson por alzacanoj, kaj parolan kurson ĉe la Universitato de la Tria Aĝo, do ĉefe por maljunuloj.

Krom la nova kamarado, mi ne konas alian SAT-anon en Alzaco. SAT-anoj estas en Loreno, Badio kaj Bazelo, sed ili estas tute disaj, tial ne estas propre SAT-a aktiveco en nia regiono. SAT-anoj de nia regiono kutime estas ankaŭ membroj de UEA kaj de la Naturamikoj, kie ili estas tre aktivaj. Do, ni renkontiĝas (plej ofte trans la ŝtatlimoj) ĉe aranĝoj de la neŭtrala movado. Cetere, neŭtralaj esperantistoj de nia regiono ne estas sektemaj, eĉ se ili ne ĉiam estas bone informitaj pri la veraj celoj de SAT. Grava eblo de renkonto en nia regiono estas la staĝoj de parolata Esperanto organizataj en Nancy, kie retroviĝas esperantistoj de Loreno, Alzaco, Luksemburgio kaj proksima Germanio. Krome, mi ĉeestis kongreson de la orienta federacio de UFE en Kolmaro, kaj kongreson de la sudokcidentgermana federacio de UEA en Stuttgart. Mi eble iros al neformala renkonto en Oberkirch. Mi havas bonajn rilatojn kun la grupo de Karlsruhe, kie estas SAT-anoj kaj membroj de Mondpaca Esperanto-Movado. Mi partoprenis ĉe tiu grupo en dialogo pri malliberejoj, kaj verŝajne revenos post la somerferioj por prezenti la katastrofplanon pri Fessenheim. Do nun mi komencas koni persone la plej aktivajn esperantistojn de la regiono.

II. Kelkaj konsideroj pri la loka realo, pri kiuj mi ŝatus atentigi miajn gekamaradojn.

Kvankam edukita en la pariza regiono, mi vivas en Strasburgo de baldaŭ 4 jaroj kaj mia persona senteco akordiĝas kun tiu de la alzacanoj. Nu, verdire mi devas atentigi miajn gekamaradojn pri mia konstato, ke kelkaj ideoj kutimaj ĉe SAT estas

multe pli kutimaj en Parizo ol en Strasburgo. Tio povas ĝeni SAT-aktivecon en Alzaco, kaj eble en aliaj regionoj. Jen du gravaj ekzemploj:
sennaciismo: se en la esperantista medio, kaj en la cerboj de multaj SAt-anoj, plu regas la erara aserto, ke SAT estas rezervita al sennaciistoj, kaj se sennaciistoj pensas, ke strasburganoj devas forgesi la alzacan dialekton por paroli nur kiel parizanoj, mi ne bezonas profetajn talentojn por antaŭvidi, ke venos al nia asocio, kies sidejo estas en Parizo, nur ŝtatoficistoj el aliaj regionoj, kaj neniu strasburgano. Se mia kurso okazus en la burĝa kvartalo Esplanade, eble mi havus sukceson kun tiaj ideoj. Sed mi metis mian kurson en la kadron de kvartala asocio de suburbo Neudorf, kiu estas pli laborista kvartalo. El socia vidpunkto, burĝoj parolas france, laboristoj alzace. El politika vidpunkto, la lasta ŝtatestro, kiu ordonis al alzacanoj, kiun lingvon ili devas paroli, nomiĝis Adolf Hitler. La lasta franca politikisto, kiu aŭdacis publike esprimi opinion malfavoran al la alzaca dialekto nomiĝas Michel Debré (1). Ĉar kutime alzacanoj, badanoj kaj alemanaj svisoj komprenas unu la alian, per la komuna alemana dialekto funkcias la movado kontraŭ militismo kaj atomcentraloj. Ĉi-tie, protekto de la paco en Eŭropo kaj de la natura medio ĉiam ligiĝas kun protekto de la kultura medio de la homoj. La ideo, ke alzacanoj devas paroli kiel en Parizo, badanoj kiel en B onn kaj svisoj kiel en Berno okulfrape favorigus la provojn de la registaroj disigi la popolon por neniigi ĝian ribelemon. El kultura vidpunkto, pluraj el la plej famaj ĉefverkoj de la germana literaturo mezepoka kaj renesanca estis skribitaj de alzacanoj en ilia dialekto. Perdo de la kapablo rekte kompreni altvalorajn tekstojn estus neriparebla perdo por la homa kulturo ĝenerale. La franca respubliko kaj ĝiaj instruistoj kompleksigas la dialektparolantajn laboristojn kredigante al ili, ke ili ne parolas kulturlingvon, kio historie estas falsa. Alzacanoj, kiuj volas, ke la provinco forlasu Francion, estas nur neglektinda minoritato, sed plimulto de la alzaca popolo deziras, ke la franca respubliko agnosku al ĝi la rajton resti alzaca, t.e. konservi sian lingvon kaj sian historie altvaloran kulturon. Tiu postulo estas konforma al la homaj rajtoj ĝenerale, kaj al la vidpunkto de aliaj eŭropanoj pri la strukturo de la Eŭropa Komunumo. Tiu kultura rajto, fakte rifuzata de la nuna dekstra registaro, estas defendata de francaj maldekstraj partioj kaj sindikatoj. Do, parizaj kamaradoj bonvolu revidi sian vidpunkton pri tiuj barbaroj, kiuj vivas ĉe Rejno, kaj kompreni, ke ideo, kiu normale venas al la cerbo de parizano, povas aperi reakcia en Strasburgo kompare kun la loka realo.
ateismo: En Alzaco kaj Moselio, la Franca Respubliko agnoskas kultojn kaj salajras pastrojn, kio estus kontraŭkonstitucia en aliaj regionoj. Se franco proponus, ke Alzacaj lokaj leĝoj pri religio estu aplikataj en aliaj regionoj, lin oni nomus reakciulo, dekstrulo, ktp... Konservadon de tiu loka statuto deziras la grandega plimulto de la alzacanoj, tial ankaŭ maldekstraj partioj surloke ne kontraŭas la okulfrapan deziron de la popolo. Alzacanoj, eĉ se ili mem ne iras al preĝejoj, konsideras, ke kolektiva preĝado estas publika servo, kaj devas do esti organizata de la publikaj aŭtoritatoj. Tiu koncepto, tute fremda por francoj (inkluzive de mi), estas kutima en aliaj landoj eŭropaj, interalie en germanlingvaj landoj. Notinde estas, ke tiu koncepto pri religio estas parenca de la menso de islamaj gastlaboristoj. Antaŭ la municipaj balotoj, mi ĉeestis publikan kunvenon organizitan en Schiltigheim por demandi la kandidatojn pri ilia sinteno rilate al gastlaboristoj. Estis nur du listoj en Schiltigheim, kaj al tiu kunveno venis nur maldekstraj kandidatoj. Oni demandis la gastlaboristojn mem, kion ili deziras de la estonta municipo. Respondo de la turkoj kaj nordafrikanoj (etnoj plej multnombraj ĉe gastlaboristoj de nia regiono): "Ĉambron por la islama preĝado". Ĉar alzacanoj konsideras kulton kiel publikan servon, tiu postulo ne surprizis la kandidatojn de la socialista-komunista listo. Mi mencias tion, ĉar dum la kongreso de SAT en Lekturo, oni parolis pri gastlaboristoj. Nu, fakte la moskeo estas baza elemento de la kulturo de parto el la gastlaboristoj. Se ni, kiel kultura asocio, volas unuflanke respekti la dignecon de gastlaboristoj, aliflanke interesi ilin al SAT, tiam SAT ne devas resti ligita al unu kulturo, blankula, kiel ĝi nun fakte estas.

Por reveni al la alzaca kulturo, la antaŭjuĝon, ke kristanoj nur povas esti dekstruloj, malas la realo en Alzaco. La ekskandidato de la socialista partio por la municipo de Strasburgo instruas protestantan teologion ĉe la (ŝtata) universitato. La redaktanto de la ĉefa ekologiista gazeto de la regiono estas katolika pastro. Estas tri regionaj ĵurnaloj en Alzaco, sur unu regule aperas sur la sama paĝo komuniko de la armeo pri la alvoko de soldatservontoj, kaj komuniko de la prokonsciencaj soldatrifuzantoj: ĝia direktoro estas katolika pastro. Ĉiu kontestemulo de Strasburgo almenaŭ unufoje en sia aktivanta vivo estis en la kunvenejo de la protestantaj studentoj, ĉu por vidi filmon pri malliberejoj, ĉu por debati pri aborto aŭ mortpuno, ĉu por kontakti plej diversajn kontraŭimperiismajn aktivantojn el plej diversaj landoj. Se oni

## RAPORTO DE LA JUNULFAKA KOMITATO (JFK) POR LA PERIODO 19780601 19790531

Kontraŭe al la impreso donita de la malfacilaĵoj kiuj trafas la JF-on, interalie larga malfruo en la apero de la Juna Penso, la Junulfako, tio estas ne nur la Komitato sed ankaŭ multaj membroj, tiun ĉi jaron grave aktivis.

Membraro, perantoj kaj lokaj grupoj :

Ni denove kompilis la SAT-sliparon, por registri la SAT-anojn malpli ol 35 jarajn. La membraro kreskis de 121 ĝis 140 anoj. Tiu kresko estas pli forta ol tiu atendebla laŭ la lastjara raporto. La novuloj venas precipe el Pollando, Japanio, kaj Francio. Ankaŭ notinda estas la ricevo de informpetoj el Hispanio. Oni povas bedaŭri, ke tro ofte membroj, supozeble junaj, ne indikis sian naskiĝjaron ; kiam tiu indiko mankas, ni ne povas kalkuli ilin kiel JF-anojn, kaj krome ni devas klopodi por ricevi tiun informon.

Sekve de la atentigo pri la graveco de la JF-peranteco, nun estas 11 perantoj (lastjare estis 4). Dezirinde estas ke tiu kresko daŭru. Restas multaj lokoj en kiuj JF-perantoj estas bezonataj. Kompreneble tiuj novaj perantoj ne ĉiam bone sentas, el kio konsistas ilia tasko. Interalie, ili ne sufiĉe raportas pri la aktiveco de la JF en la responda regiono. Eble tro ofte ili pensas ke ĉar ne estas tuja evidenta rezulto, ili ne aktivis. Unu el la taskoj de la perantoj estas informi pri la loka situacio por ebligi komunan pripensadon pri la trafitaj problemoj. Taŭga analizo de situacio estas necesa preparode la JFagado. Alia tasko de la perantoj estas iniciati en la loka agado, kaj favori unuopajn iniciatojn kaj iniciatemojn. La rilatoj de la JF-perantoj kun la JFK estas necesaj, ne por nura informado de la JFK, sed por ebligi al tiu, ke ĝi informu la tutan junulfakon. Tiu informado estas tre grava por ebligi laboron vere efikan. Dezirinde estas, ke la raportoj estu sufiĉe regulaj kaj oftaj, Kiam oni ne havas la tempon, la eblon tuj pretigi detalan raporton, oni tamen koncize informu pri la aktiveco eĉ se nur modesta. Ekzemple du aŭ tri vortojn sur poŝtkarto oni sendu antaŭ la definitiva raporto. Tiurilate markis iniciatemo, kaj ne estas normale kiam ni devas admoni kaj readmoni por ricevi informojn.

Ni tamen ricevis raportojn de JF-perantoj pri la lokaj agadoj kaj situacioj. Evidentas ke la loka JF-aktiveco ne limiĝas al tio, kio estis raportita. Konforme al la Gotenburga konvencio, la SAT-Junuloj loke agadas en la kadro de la LEA-grupo, kaj tial ofte forgesas ke tiu aktiveco koncernas la Junulfakon, ĉar ĝi estas JF-aktiveco.

Nia hungara peranto, Bèla Kovàcs, regule raportis pri la loka SAT-junulfaka vivo. Ekzistas simpatio al SAT, kaj eblecoj por ĝi disvolviĝi en Orienteŭropo, sed la unuaj paŝoj ŝajnas tre malfacilaj. La rezulto ne estos tuja, sed li daŭre informas ĉirkaŭ si pri SAT, varbas novajn abonantojn al LJP, kaj tiel iom post iom progresigas la SAT-aferon.

Agadplano

La JF-anoj plu ricevas La Juna Penso sen kroma abono. La malfruo en la apero de LJP eble malkuraĝigis la JF-anojn en verkado de artikoloj por LJP. Malgraŭ tiu malfruo, oni verku artikolojn kaj sendu ilin al la redakcio : ĉiuj aperos siavice.

Pri la Cirkulantaj Leteroj okazis ŝanĝo de prizorganto. Lilia Ledon jam komencis sian laboron, kaj certe ŝi baldaŭ povos sendi materialon por LJP.

La SAT-JF estis aktiva rilate esperantistajn junularajn asociojn. Tiuj asocioj estas TEJO kaj PSEK. Post la Lektura Kongreso, Oscar Piug estis delegita al la TEJO-Kongreso en Veliko-Tirnovo. Tie li prezentis proponojn de kunlaborado inter SAT-JF kaj TEJO. Ni atendas la respondon de TEJO pri tiuj proponoj. SAT-JF reprezentanto estis invitata de PSEK al seminario pri la temo "Esperanto serve al la Junularo", dum kiu decidiĝis kunlaborplano. (vd. p.36)

Tiun ĉi jaron, la JFK ne sendis solidarecdeklaron aŭ protestleteron, ĉar jam superŝutita de diversaj taskoj la JFK ne povis iniciati ion tiurilatan. Kompreneble se venas propono tuj realigebla, la JFK povos efektivigi.

Pri la starigo de laborgrupoj ni ricevis nenian informon. Tiuj kiuj sin proponis en Gotenburgo por organizi tiajn laborgrupojn estas petataj sciigi pri la stato de la laboro en sia grupo.

Kaso (raporto por la periodo 19780101-19781231, ĉiuj sumoj enFF)

| EnSPEZOJ | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|
| | | poŝtmarkoj | 230,20 |
| Saldo antaŭa | 2045,56 | slipoj kaj sliparo | 92,90 |
| | | diversaĵoj | 5,00 |
| | ---- | Saldo nova | 1717,46 |
| | 2045,56 | | 2045,56 |

Komentoj : Tiu bilanco sufiĉe klare spegulas nian ĝenon por uzi la Junulfakan monon post la okaza subvencio de la PK. Ni ŝpare elspezis, sed nun, pro la disvolviĝo de la JF-aktiveco, plifortiĝas la bezono je mono. Car la JF-aktiveco ne estas ekstera al tiu de SAT, sed ja parto de ĝi, ni proponas, ke la financa pezo de la JF agado estu eltenata de SAT, propore cie al la nombro de la junulfakanoj en SAT.

Junulara Angulo en S-ulo

Denove ni rememoriĝas, ke tiu rubriko ne estas rezervata al la JFK, kaj ke ĉiu JF-ano povas kontribui en ĝi. Ni substrekas, ke tiu rubriko estas ia montrejo de la Junulfako en la oficiala organo de SAT : ĝi devas speguli la vivantecon de la Junulfako en SAT. Redaktas tiun rubrikon Lus Demmendaal. Adreso : Bethlehemstraat 23e 3061 6A Rotterdam Nederlando.

La Juna Penso

La problemo de La Juna Penso ne kuŝas en verkado aŭ financo : manuskriptoj kaj abonoj same regule alvenas, tamen en malpli granda kvanto kiam la apero de LJP-numero tro longe atendiĝas. Oni devas aten i ke la abonoj kaj vendoj kovras ĉiujn LJP-kostojn. Danĝera estas la malkresko de la abonantoj ne Junulfakanoj dum la nombro de presitaj ekzempleroj restas proksimume la sama. Ne nur pro financaj konsideroj la JF-anoj varbu abonantojn al la Juna Penso. Per plivastigo de la legantaro disvolviĝos la demokrata diskutado de la Junulfako kaj de SAT, per tiu ekzemplo aperos, tiel funkcias la SAT-movado, kaj tio instigos la legantojn al aliĝo al, kaj aktivado en SAT. Oni plu uzu la Junan Penson kiel informilon en la Junulfako, kiel varbilon kaj diskutilon inter (ne nur) la junuloj.

La problemo de la Juna Penso estas nur materia, sed nun atingis gravan gradon. Temas nur pri materia organizado kiun ni ne plu povas taŭge plenumi. Nia provizora, jam 3-jara LJP-prizorgado devas ĉesi, tio estas ke anstataŭa teamo estas petata. Kompreneble, se necesas ni ne subite forlasos la prizorgadon tiel ke la ŝanĝo de teamo okazu sufiĉe glate. Du aŭ tri personoj disponantaj pri iom da tempo povas sufiĉi por tiu transpreno. Ju pli granda estas la teamo, kompreneble despli facila estas la laboro.

Cetere, en okazo de ŝanĝo de teamo, la jamaj kunlaborantoj, notinde Kinoj Meurant, Françoise Loizeau, kaj Chantal Paliot por la Pacista rubriko, kiuj tajpas multajn stencilojn, certe bonvolas labori kun la nova teamo.
Nepras memori, ke ne normale estas ke la JFK, kiu jam havas specifan laboron, krome persone zorgu pri LJP-redaktado kaj-eldonado.

LJP-kasraporto

| ENSPEZOJ | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|
| Abonoj | 3730,30 | Presado | 1680,29 |
| Donacoj | 168,14 | Afranko | 846,60 |
| Vendoj | 40,60 | Broŝurservo (mono repagita al Kribo) | 591,00 |
| Broŝurservo (mono ricevita) | 365,50 | Diversaĵoj (administraj elspezoj) | 47,30 |
| Antaŭa saldo | 3136,34 | Nova saldo | 4275,69 |
| 7 | 7440,88 | | 7440,88 |

La stato de la kaso ŝajnas bona, sed fakte la alta saldo, kiu aperas, klariĝas per tio, ke la reabonoj por nova jaro jam okazas antaŭ la fino de la lasta. La salda mono devas do kovri eldonadon de la lastaj LJP-numeroj de la finiĝinta jaro kaj de ĉiuj de la jam komencita. Krome, jam de longe, oni neglektis kalkuli en la elspezoj la monon necesan por la renovigo de la materialo, tio estas ĉefe de la presmaŝino. Iom neglektita estis ankaŭ la aĉeto de kroma materialo, kiu povus faciligi la laboron.

Malgraŭ tiuj mankoj, ni, krom kelkaj reĝustigoj, ne proponas tarifplialtiĝon, kiu estus malbone akceptata pro la nuna malfruo de la gazeto, sed ni invitas ĉiujn finance subteni LJP-on por renovigo de ties materialo.

Konklude

... Kvankam la nunaj JFK-anoj pli dise loĝas ol antaŭe, ne tio ĝenas ilian laboron. Precipe ĝenas la koncentriteco de tio pezaj taskoj por tio malmultaj personoj. Lastjare, ni vokis al novaj kandidatoj por JFK, tiuj kandidatoj ne necese loĝu en Parizo. La nocio pri ebleco facile kunveni estas relativa ; gravas ĉefe, ke la laboro estu farita kaj bone farita. Plu disvolviĝu la demokrata funkciado de la JUnulfako, per multiĝo de la JF-perantoj, per ĉiam pli larĝa esprimiĝo de la junulfakanoj en La Juna Penso kaj dum la kunvenoj kaj Kunsidoj.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

IZABO (p. 17) : popolkanto el Francio aŭ eble el Kanado tradukita de Tivin.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Stanisław Rybicki (1951) ,str. Kochanowskiego 20-B-1, 80-402 GDAŃSK-WRZESZCZ,Pollando deziras havi kontaktojn kun aliaj SAT-anoj, kaj SAT-amikoj.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

PRESNOTO

Pro urĝemo, ĉar la stenciloj 8 kaj 9 ne estis prespretaj, la paĝo 10 erare estis presita dorsflanke de la paĝo 7. Ni decidis jene ordigi la paĝojn: 7-10-11-8-9-12, esperante tiel plej malmulte ĝeni la leganton. Ni petas pardonon pro tiu mallertaĵo.
LJP-prizorgantaro.

deziras organizi en Alzaco debaton pri civila malobeado, la ĉambreton, kie ĝi kunvenas, certe pruntedonos la anarkiista grupeto, kaj la salonon de la paroĥo tre verŝajne pruntedonos la pastro aŭ la pastoro (eble li mem resendis sian soldatlibreton, aŭskultas malleĝan radion, kaj okupadis terenon antaŭviditan por atomcentralo). Se oni elektas la duan eblon, venos multe pli da homoj al la debato. Cetere, mi volas atentigi, ke tiu situacio, kvankam pli tradicia en Alzaco, ol en aliaj regionoj de Francio, ekzistas en aliaj lokoj.

Finfine ni estas en SAT por kompari faktojn kaj ideojn, ĉu ne ? Nu, faktoj pri la reala situacio de la kristanaro en 1979 venigas min al la ideoj, unue ke miaj ateistaj kamaradoj malfruas je kelkaj subteraj trajnoj, kiel oni diras franclingve, due, ke fanatikeco estas nenies monopolo, trie ke, se SAT prezentas sin kiel ateista sekto, tio ŝokos la kutimojn kaj sentojn de multaj maldekstruloj, ne nur en Alzaco, kaj ke restos for de nia asocio esperantistoj, kiuj povus fariĝi valoraj kamaradoj. Fakte, laŭ mia kono, ĉiuj SAT-anoj, ĉiuj SAT-Amikaranoj kaj ĉiuj abonantoj de "Laŭte" en Strasburgo estas kristanoj. Dependos nur de niaj gekamaradoj, ĉu ni estos en SAT disidenta minoritato, aŭ egalrajtaj kamaradoj.

Konklude, kiel scias ĉiuj, kiuj atente legas miajn artikolojn, mi estas nek sennaciista, nek ateista. Mi aliĝis al SAT zorge leginte ĝian statuton, kaj ne vidinte, ke aliĝo estas rezervita nur al tiuj kategorioj. Mi plu klarigos al alzacaj esperantistoj kaj lernantoj, ke SAT ne havas ideologion, kaj ke oni aliĝas al ĝi surbaze de ĝia statuto, kaj de nenio alia. Mi esperas, ke nek en la regiono, nek en la asocio, kontraŭdiros min SAT-anoj.

Jacqueline Lépeix, 32199, junio 1979

(1) Pri Debré estus multo por diri; mi mencias nur, ke respondecas li pri la projekto plivastigi la militterenon en Larzako. Lia opinio pri la alzaca dialekto estas, ke ĝi minacas la unuecon de la Nacio.

---

## Vojaĝo al Pollando

Dum unu monato, mi vojaĝis tra Pollando gvidata de mia jam malnova amiko Walter, kiu montris al mi sian landon sub ĝiaj diversaj aspektoj, ne nur turismaj, sed precipe homaj. Li montris al mi multajn vidindaĵojn famajn aŭ ne, sed li ankaŭ kontaktigis min kun multaj diversaj homoj, diverse pensantaj kaj permesis al mi multe diskuti kun tiuj diversaj homoj per siaj paciencaj tradukadoj Polaj-Esperantaj kaj Esperantaj-Polaj. Mia celo ne estis propagandi por SAT aŭ eĉ por Esperanto, sed nur konatiĝi simpatie kun homoj vivantaj en alia loko kaj en alia politika sistemo ol tiu en kiu mi mem vivas. Pro tio mi nun rakontos ne nur tion, kio interesas rekte la esperantistojn kaj la SAT-junulojn kiel tiajn, sed mi rakontos ankaŭ miajn impresojn pri ĉio, kion mi vidis. Eble ne ĉio, ĉar estus tro multe, sed almenaŭ tio, kio ŝajnis al mi plej grava. Jen mia vojaĝo tago post tago.

16-8-1978: Vojaĝo al Pollando. La suno brilas sur Varsovio. 24°. De la ĉielo, Pollando havas belan aspekton: nenia dezerto, ĉie estas domoj kajdometoj, kiuj ne amasiĝas, escepte en la grandaj urboj. Mi ne konas la polan lingvon, sed la homoj estas afablaj kaj paciencaj : ĉie mi renkontas helpon ĝis mia alveno en Rzeszów.

17-8-78 : Mi loĝos en studenta hotelo dum 6 tagoj. Tiu domego estis konstruita antaŭ jardekoj, sed nenio mankas el tio kion oni kutime bezonas. La aspekto de la necesejo kaj de la duŝejo ne estas tre bela, sed ĉio funkcias, kaj mi povas uzi ĉion, kiel ofte mi deziras. Fakte mi miras pro la moderneco kaj la aktualeco de tiu malnova domego. Tio komparebla, kion mi vidis en Francio, estis multe pli nova, kaj pli bele aspekta, sed ĝi estis verŝajne malpli solida, kaj alportis nenion pli por la konforto.

Mi iras en la urbo por aĉeti manĝaĵon. Mi rigardas la prezojn atenteme : por unu zloto, oni povas ricevi iomete pli ol en Francio por unu franko. La vendejoj aspektas malpli agresemaj, ol tiuj kiujn mi kutimas viziti, kaj mi tuj trovas tion kion mi deziras, sen perdo de tempo. La prezento de la vendaĵoj estas pli simpla kaj malpli trompa . La vendejoj similas deponejojn, kie oni povas trovi ĉion kion oni bezonas. Ili estas trankvilaj. Ne estas 36 specojde ĉiuj aĵoj, sed ĉio estas orde lokita, kaj oni tuj vidas, se ne tion kion oni serĉas, almenaŭ tionkion oni povas aĉeti. La ebla elekto ne estas grandega, sed se temas pri manĝaĵo, oni povas elekti kion ajn, tio estas ĉiam bongusta.

Mia amiko Walter montras al mi la urbon. Kvankam ni estas en granda urbo, min unue misigas la dolĉeco de la vivritmo : la homoj estas afablaj kaj malstreĉitaj. La knaboj estas afable kaj vere galantaj, kaj ĉiuj estas helpemaj unu por la alia. En la aŭtobuso, graveda virino ne restas pli ol 30 sek. staranta ! Estas ĉiam multe da homoj en la aŭtobusoj, sed ĉiam la plej maljunaj homoj, kaj la plej malfortaj povas sidi. →

# ESPERANTUJO

Mi vizitis la hejmon de Ĝiorĝio antaŭ kvar jaroj, kiam mi tralegis en "Sennaciulo", ke li organizas labortendaron en loko Cavalcaselle. La hejmo de Ĝiorĝio situas apud la aŭtvojo, kiu ligas Venecion kun Milano.

Ĝiorĝo aĉetis domon kun ĝardeno antaŭ nelonge, pensante ke ĝi estos por esperantistoj. Ĝi nomiĝas "Esperantujo". Bedaŭrinde, ĉar li ne havis sufiĉe da mono, iomete helpis al li private aliaj esperantistoj, ĉar liajn planojn ne akceptis esperanta asocio.

La domo estis malnova, el ligno, ĝi bezonis riparon. Ĉiuj labortendantoj estis 17 el 10 landoj. Ni tralaboris 14 tagojn ; sep horojn tage, konstruante somerdometon (bungalow) por aliaj esperantistoj. Nuntempe, ni tranoktis en hejmo de Ĝiorĝo, kie ne estis tro komfortaj kondiĉoj. Dum la tendaro manĝaĵojn por ni preparis Lia – edzino de Ĝiorĝio. Tre ofte dum la tagmanĝo ni estis sume (kun gastoj) 20–25 personoj. Ĉion pagis Ĝiorĝio : maŝinojn, laboristojn, manĝaĵon. Li prenis speciale prunton el banko.

Ĝiorĝio estas ekonomiisto, instruas en altlernejo kaj antaŭ kvar jaroj li havis en Peschiera malgrandan privatan oficejon.

Cavalcaselle situas nelonge – 5 km – de Peschiera, belega ripozloko apud Lago de Garda. Do, la ĉirkaŭaĵo estas belega. La labortendaro al mi plaĉis, ĉar ĝi havis hejman (intiman) atmosferon, ĉiam estis movado ; la hejmon vizitadis multaj personoj, ni neniam enuis.

Mi partoprenis en 4 labortendaroj : en Bulgarujo, Jugoslavio, Italujo, Hungarujo, sed en mia opinio plej interesaj estis du : jugoslava kaj itala ; tute private organizita estis nur la itala.

Pasintjare, mi tute neatendite vizitis la hejmon de Ĝiorĝio. La riparo de la domo estis jam finita ; Ĝiorĝio lasis la oficejon, nur instruis en lernejo ; la somerdometo estis preta kaj ĝi atendis gastojn. En projektoj de Ĝiorĝio estis ankoraŭ konstruo de manĝejo.

Dum la riparo de la domo, krom Ĝiorĝio kaj lia edzino helpis iliaj familianoj. Kiel diris al mi la bopatrino de Ĝiorĝo, la domo kaj la ĝardeno apartenas al Esperantistaro. Do, mi devas konfesi, ke en miaj oftaj kontaktoj kun esperantistoj mi unuan fojon, vidis homo, kiu tiel multe faris por Esperanto. Lia hejmo ĉiam estas malfermita por esperantistoj.

Lia adreso : Ĝiorĝio Vandelli, c : Esperantujo – 37010 – Cavalcaselle – Italio.

Daniela Matray
(el Łódź)

---

Vojaĝo al Pollando (daŭrigo)


Kontraŭe al ĉio kion oni kutimas en Francio, ĉi tie oni ne estas ĉiam agresata de reklamoj sur la muroj kaj el la vendejoj. La muroj estas dekoritaj per veraj artaĵoj, kaj la maloftaj videblaj reklamoj estas dolĉaj kaj belaj por la rigardo. Plie, la reklamoj tiam celas la vivkvaliton pli ol la konsumadon. Ekzemplo : reklamo kontraŭ alkoholismo.

Walter kondukas min en "rapida manĝejo" kie ofte manĝas la studentoj : vera festeno ! Ĉio havas tiel "hejman" kaj "naturan" guston ! Same vespere, kiam mi gustumas tipe polan manĝaĵon : riz-kaj tomatsupon kaj specon de saŭrkraŭto kun porka viando kaj kaĉa platkuko el terpomoj kun lakto kaj ŝenoprazo.

Mi ankoraŭ ne vizitis interne historian monumenton, sed mi vidis multajn belegajn malnovajn domojn, preĝejojn, kaj aliajn konstruaĵojn restarigitajn. Fakte Pollando estas la lando kie oni donas la plej grandan parton de buĝeto al la konservado de historiaj monumentoj. La preĝejoj estas belegaj, kvankam pagitaj precipe de la fideluloj kiuj tamen konsistas el 70 ĝis 80% de la loĝantaro. La ŝtato kuraĝigas la konstruadon de preĝejoj planitaj de veraj artistoj, kvankam ĝi kiel komunista ne speciale kuraĝigas la religion. La katolikoj formas kvazaŭ partiajn asociojn "ne politikajn", sed kun politika karaktero kaj politike orientitaj kontraŭ la Ŝtato. Ili ne estas subpremataj kaj eĉ posedas vendejoj specialigitajn pri religiaj libroj kaj objektoj.

Ni ankaŭ vizitis kelkajn publikajn kulturajn domegojn kiuj estas troveblaj en ĉiuj urboj. Ankaŭ tie, mi miris pro la beleco de tiuj konstruoj modernaj kvankam jam malnovaj. Interalie, mi vidis bibliotekon, kie troveblas ĉiaj libroj. Ĉiu civitano povas aliri, kaj konsulti la verkojn, kiujn li deziras. Ĉiuj sufiĉe nombre gravaj gazetoj el la mondo estas facile atingeblaj kaj ĉiutage renovigitaj. Tiel mi vidis inter → 30

# KIA EŬROPO? KIA DEMOKRATIO?




SE ONI RIGARDAS MAPON DE LA LANDOJ DE EŬROPO, TRUDIĜAS DEMANDOJ :

- Kiel Eŭropo estis disigita al du blokoj ?
- Kiel Eŭropo, kiu estis reganta povo en 1939, estis regata en 1945, okcidente de Usono, oriente de Sovetio ?
- Kiel disvolviĝis en okcidenta Eŭropo la "konsumsocio"?
- Kiel opinii pri la "Eŭropo de la 9" ?
- Kiel opinii pri la eŭropaj balotoj ? Kiel esti hodiaŭ vera eŭropano ?

# EUROPO HODIAŬ ?

## HISTORIAJ FAKTOJ

- Eŭropo, en 1939, tuj antaŭ la milito, ankoraŭ ludis gravan rolon, ĉefe pro la koloniaj imperioj de Francio kaj Britio.

- En 1945, la situacio profunde ŝanĝiĝis. Usono fariĝis mondpotenco. Neniu parto de ĝia teritorio estis atingita de la milito, kaj ĝi perdis per tio nur 300 000 homojn (por la sama milito, Sovetio havis 18 milionojn da mortigitoj). En Usono, la nacia bruta produkto kreskis dum la kvin militjaroj de 95 ĝis 215 miliardoj, t.e. kresko je 120 %. Usono posedas du trionojn de la monda stoko da oro kaj la industria produktado pli ol duobliĝis. Ciuj popoloj dependas de Usono pri nutrado, industriaj produktoj kaj teknologio. Nur ĝi posedas atombombon.

Usono, en 1945, kontrolas la mondon (krom Sovetio kaj Orienteŭropo), ĝi estas riĉega lando. Per diversaj pruntoj, notinde tiuj de la Marshall-plano (1947) ĝi partoprenas en la relanĉado de la ekonomioj de Eŭropo Okcidenta. Ĝi certigas ankaŭ la militistan defendon de tiu parto de la kontinento, kiu ligas sin al la usona defendsistemo per la Atlanta Interkonsento en 1949. Tiu defendsistemo atingos multajn regionojn de la mondo per diversaj interkonsentoj.

- Dum tiu tempo leviĝas oriente alia granda potenco : Sovetio.
Vastegaj regionoj de tiu lando estis damaĝegitaj per la milito, kaj ĝia industria produktado malkreskis dum tiu tempo je 42 %. Ĝi povas atingi la rangon de grava potenco nur per materiaj foroferoj, kiujn ĝia popolo konsentas ankaŭ dum pactempo, kaj per la helpo alportata de orienteŭropaj landoj. Ekde 1949, ĝi posedas atombombon, kio obligas al ĝi prezenti sin kiel egalan al Usono.

## KIEL TIUJ FAKTOJ ESTIS VIDATAJ ?

- Kutime oni diras : Granda parto de la publika opinio insistis kaj plu insistas pri la liberigo de niaj teritorioj far la usonanoj en 1944. Krome, tiu opinio rimarkigas, ke la ĉeesto de Usono sur nia kontinento certigis sekurecon (kiu scias, ĉu sen la ĉeesto de usonanoj ĉe ni rusoj ne invadus nin !). Fine la usona ekonomia helpo kaj la multnaciaj societoj estis la rimedo de la prospero de Okcidenta Eŭropo. Tamen tiu lasta punkto estas malpli mensciata ek de la foriro de multaj multnaciaj societoj el niaj landoj.

- Ekzistas alia analizo de tiuj faktoj : iuj vidas tiujn eventojn per tute alia rigardo. Usonanoj elŝipiĝante en junio 1944 sur la normandajn marbordojn, jam havis planojn pri okupado de nia teritorio, eĉ novajn biletojn cirkuligendajn. Niaj registaroj kaj la rezistantoj ne permesis realigadon de tiuj planoj. Usono, per siaj ekonomiaj helpoj, realigis veran regadon ekonomian de Okcidenta Eŭropo. Ĝiaj ekonomiaj interesoj estis defendataj per la enigo de niaj regionoj en la usonan defendsistemon. Niaj politikaj reĝimoj dependis de Usono, kaj tuta ideologio disvastiĝis en niaj landoj per gazetaro, revuoj, libroj. Tiu ideologio predikis kaj plu predikas ekonomian liberalismon, kapitalismon, senbridan lukton kontraŭ komunismo, ĝi subtenas ankaŭ formon de disvolviĝo, kiu fakte estas formo de usoniĝo de nia vivo. Tiun formon de socio oni nomis konsumsocio. Ekonomiaj interesoj, armeo, politika organizado, ideologia konceptado, jen kvar rimedoj, kiuj certigas al Usono regadon en Eŭropo Okcidenta, kiel ankaŭ regadon en multaj mondregionoj. Kelkaj landoj ludas rolon de perantoj de Usono en Eŭropo Okcidenta, tiun mision plenumas la Federacia Respubliko Germanio.

Per samaj rimedoj Sovetio realigas saman regadon en la landoj de Orienteŭropo. La komunistaj partioj de tiuj landoj havas ekskluzivan influon. Ĉe ni ekzistas liberon. Tamen la aprobantoj de tiu teorio rimarkigas, ke nia libereco estas relativa. Se temas pri ekonomiaj interesoj - ekzemple en Iranio en 1953, en Guatemalo en 1954, en Sankto Domeniko en 1965, en Ĉilio en 1973, usonanoj tiam intervenas rekte aŭ malrekte pro protekti tiujn interesojn, eĉ se por tio oni devas malaperigi politikan reĝimon.

Demandoj : Kiu estas nia kutima analizo pri tiuj faktoj ? Ĉu ni kontentiĝas per la reganta opinio ? Ĉu ni provas insisti pri ekonomiaj interesoj, politikaj premoj, ideologia propagando ? Pensante pri "Eŭropo", ĉu ni ne ofte pensas pri Eŭropo Okcidenta ? Ĉu Eŭropo regata de Usono gardis sian originalecon ?

# EŬROPO DE LA 9 KAJ LA EŬROPAJ
# BALOTOJ DE JUNIO 1979?

## HISTORIAJ FAKTOJ

* Per la interkonsento de Parizo (1951/04/18), ses landoj, Germanio, Belgio, Francio, Italio Luksemburgio kaj Nederlando kreas la Eŭropan Komunumon pri karbo kaj ŝtalo, t.e., estas starigita por ses landoj komuna merkato por karbo, ferаĵoj, fergiso kaj ŝtalo.
* Per la interkonsento de Romo (1957/03/25) estas starigata unuiĝo dogana kaj ekonomia inter la jam cititaj 6 landoj, kaj tiu unuiĝo devas ebligi liberan cirkuladon de personoj kaj aĵoj kaj harmoniigi politikojn ekonomiajnkaj sociajn. Ĝi devas harmoniigi ankaŭ dogantaksojn rilate al landoj, kiuj ne partoprenas en la komunumo.
* Samdate estas kreata la eŭropa komunumo pri atomenergio, kiu devas favorigi la esploradon en la tereno de atomenergio.
* 1965/04/08 fandiĝas la tri plenumoj (komunumo pri karbo kaj ŝtalo, eŭropa ekonomia komunumo, komunumo por atomenergio).
* 1972/01/22 kreiĝas la Eŭropo de la 9 per alveno de Danio, Britio kaj Irlando 1974/12/10 decidas ŝtatestroj kaj registarestroj elektigi la eŭropan parlamenton per publika baloto ek de 1978

## KIEL TIUJ FAKTOJ ESTAS HODIAŬ RIGARDATAJ ?

De la ĝenerala opinio.

La Eŭropo de la 9 ne estas tre ŝatata de la popoloj, kaj tiuj datoj kaj eventoj ne estas tre kutime konataj. Ŝtatlimoj, rimarkigas multaj plu ekzistas ; monoj restas diversaj. Kamparanoj devis sin levi multfoje kontraŭ eŭropaj decidoj de ministroj. Oni detruis stokojn da nutraĵoj (tomatoj, terpomoj). Oni vendaĉis je malalta prezo grandajn kvantojn da butero. Eŭropo ? "La Eŭropon de la 9 mi ne konas" povus diri multaj.

De la aprobantoj de la Eŭropo de la 9.

".Neniam estis Eŭropo, nur ŝtatoj pli potencaj regis aliajn, kiel la Hispanio de Karlo V, la Francio de Ludoviko XIV kaj Napoleono, kiel la Germanio de Hitler.
Dum 25 jaroj, Eŭropo entreprenis fari sin mem ambaŭ pace kaj demokrate". (Eŭropo 1978- broŝuro por finaj klasoj de liceoj, realigita de eŭropaj oficistoj, disdonata de la Popola Centro Eŭropa).
Unu lando ne povas sole solvi siajn problemojn. Eŭropo estas neceso.
Elektado de eŭropa parlamento per publika baloto ŝanĝos ĉion "Falsas, klarigas sinjoro Davignon, membro de la komisiono de la eŭropa komunumo, la rakonto, ke tiu parlamento ne havos verajn povojn ; ĉiam parlamentoj havis nur la povojn, kiujn ili forprenis de la plenumpotenco", tion li diris en Nivelles la 8an de junio 1978. "Mi ne kredas, ke tiu elektita parlamento kontentiĝos per la relative limigitaj rajtoj, pri kiuj ĝi nun disponas" diris sinjoro Schmidt, kanceliero de Germanio Okcidenta (Le Monde, 1978/11/15). Siaflanke Giscard d'Estaing klarigis en sia gazetara konferenco la 21an de novembro 1978, ke oni neniel povas plivastigi la kompetentecon de la eŭropa asembleo.

Pri anekdota historio, ni notu detalon, sed tre signifan : 350 milionoj da belgaj frankoj estis metitaj al la dispono de la Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj kaj de la Eŭropa Parlamento por fari kampanjon per grandaj reklamaj agentej[oj] favore al Eŭropo en la9landoj de la komunumo du[m] la unua trimestro de 1979. La politikaj partioj daŭrigos tiun kampanjon dum la dua trimestro.

De tiuj kiuj faras alian analizon.

- La Eŭropo de la 9 fariĝis sub influo de Usono, kiu regas Eŭropon okcidentan. Ĉia ekonomia help[o] ĉia ekonomia regado, trudas kun si modelon de socio. Nia Eŭropo usoniĝis. Kutimoj, lingvo, vi[v]maniero, mastruma sistemo, teknologio venis al [n]el Usono. Nia vivnivelo progresis, sed ni parto[p]renas en sistemo de ekspluatado kaj regado de [la] Tria Mondo. Gvidanto de tiu regado estas en Eŭr[o]po la germana federacia respubliko. Claude Juli[en] resumis tion en "Monde diplomatique" en majo 19[..] kaj tion malkovris multaj eŭropanoj per pripensa "Kaptita de malfacile imagebla paniko, Eŭropo, antaŭ 25 jaroj, atendis la amasan invadon per sovetaj soldataĉaroj. Tiu timo ne realiĝis, sed ĝi ebligis kaŝi alian submetiĝon pli subtilan k[aj] pli allogan al usonaj kapitaloj kaj al la malsimpla reto de monaj kaj komercaj rilatoj. Tiam havis eble Eŭropo ŝancon esti eŭropa . Hodiaŭ l[a] ĉefan malavantaĝon de la "multnacia asembleo" (t.e. la eŭropa parlamento), kiun oni denuncas, ne estas premi naciajn suverenecojn jam subjugitajn de la ekonomia potenco de Usono, sed liver[i] dubindan demokratan pravigon al Eŭropo vasala, Eŭropo atlanta, ne eŭropa".

- Politikó, diris iu, bedaŭrinde estas ofte rimedo por havi "konsenton" de la publika opini[o] por ke financistoj realigu maksimuman profiton.

DEMANDOJ : ~~Ĉu la eŭropaj balotoj, la eŭropa parlamento ne estus~~ morgaŭ la demokrata kovrilo de la kapitalisma Eŭropo: la eŭropa komunumo? Ĉu ne ekzistas alia koncepto pri la demokratio? La efektiva partopreno de la civitanoj en la ekonomia kaj politika regado!

## N I A   T A S K O   K I E L   H O D I A Ŭ A J   E Ŭ R O P A N O J

FORMI POLITIKAN VOLON, kiu celus :

* Eŭropon sin liberigantan el kuratorecoj usona kaj soveta.
* Eŭropon laborantan aktive al la realigado de paco en la mondo per malarmado kaj harmonia disvolviĝo de popoloj.
* Eŭropon realigantan veran kunlaboron kun evoluantaj landoj kun reciproka respekto de kulturoj cele al justa disdono de ekonomiaj avantaĝoj.
* Eŭropon konstruantan demokratecon, kie la partoprenado de civitanoj estus efektiva en la terenoj ekonomia kaj politika, notinde donante gravecon al la regionoj.
* Eŭropo retrovantan sian identecon.

POR TIU CELO, NI DEVAS :

Klare vidi :

- Meti al ni la verajn problemojn (tiu artikolo prezentas kelkajn fundamentajn demandojn).
- Instigi en niaj movadoj debatojn pri Eŭropo.
- Sugesti al movadoj, en kiuj ni partoprenas, grupiĝi kun aliaj, por meti al politikaj asocioj kaj iliaj gvidantoj demandojn pri Eŭropo. Balota tempo estas tro ofte nebula tempo. Ni devas trudi al la partioj klarecon.
- Trejniĝi por realigi profundan politikan analizon. Ĉiu problemo ĉiam havas flankon - tiom gravan - kiun oni obstine kaŝas.
- Konsciiĝi pri la gravecon de internaciaj problemoj. Nia mono, kiun laŭdire oni volas defendi, dependas de fremdaj grupoj kaj internaciaj instancoj ; prezaltigo de petrolo decidita de produktlandoj sekve ekzemple de usona politiko pri la dolaro povas altigi ĉiujn niajn prezojn.

Sed tiuj internaciaj problemoj ĉiam estas preteratentataj en balota kampanjo.

Preni nian destinon en niajn manojn, inventi, imagi ... kaj lukti.

- Subteni sindikatan agadon skale de Eŭropo. La eŭropa federacio de sindikatoj devus povi oponi firme en la venontaj jaroj al la agado de multnaciaj societoj.
- Reproprigi al ni tion, kio apartenas al ni, t.e. la rajton esprimi nian opinion, interveni kaj decidi pri mastrumado de nia kvartalo, nia urbo kaj nia regiono, pri organizado kaj mastrumado de niaj entreprenoj, ~~niaj lernejoj,~~ niaj malsanulejoj, pri starigado de sanflegado, ktp.
- Por tio ni devas cirkuligi la informojn, kiujn ni posedas, imagi renkontejojn por homoj, helpi personojn kuniĝi por konkretaj celoj de luktoj, almeti tiujn celojn kaj luktojn al la politika nivelo kadre de planado sufiĉe vasta kaj malrigida.

La vojo estos longa, sed ni ne forgesu : "Profunda ŝanĝo ĉiam naskiĝas per izolitaj eventoj ŝajne negravaj fronte al la ekonomia povo kaj al la rimedoj de la politika povo". Minoritatoj faras la historion.

Tiu teksto aperis en decembro 1978 en La Lucarne, monata informilo pri aktualaj temoj, ĉe Michel PAPELEUX, 11 rue de Monnel, 7500 TOURNAI, Belgio. Esperantigis ĝin Ĵaklino Lepeix, ĉar ŝi opiniis, ke ĝi validos ankoraŭ post la balotoj.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Enhavbibliografio de Esperantaj periodaĵoj 1887-1978

Por prilaborata "Enhavbibliografio de Esperantaj periodaĵoj 1887-1978" ĉiuspecajn malnovajn Esperanto-gazetojn serĉas: Edward Wojtakowski, P.O. Kesto 312, PL 50-950 WROCŁAW 2, Pollando. Rekompenco per poŝtmarkoj, Esperanto-libroj ktp.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

FAJLILO --Ĉu vi havis problemojn kun la fajlilo kiun mi metis en la kukon - demandas la edzino al malliberulo. -- Jes, kara. Morgaŭ oni operacios min. (Kompilis Kreŝo)

## "HEROLDO" TRANSLOKIĜOS AL MADRIDO

En sia 58-jara ekzistado, "Heroldo" nur dufoje ŝanĝis la eldonlandon : unuafoje en 1936, kiam - antaŭvide al naziaj persekutoj - la fondinto, Teo JUNG, forlasis Kolonjon kaj instalis la gazeton en Hago (Scheveningen) ; duafoje en 1962, kiam la redaktadon transprenis S-ino Ada Fighiera-Sikorska, loĝanta en Bruselo.

Nun la familio Fighiera translokiĝos al Madrido kaj "Heroldo" sekvos ilin. La kaŭzo estas, ke S-ro Gian Carlo Fighiera, prezidanto de la laŭleĝa senprofitcela societo, kiu eldonas la gazeton, akceptis novan postenon en la hispana ĉefurbo, ĉe interregistara organizaĵo, apartenanta al la familio de la Unuiĝintaj Nacioj : lia unua tasko estos prepari la Mondan Turisman Konferencon, kiu okazos en Manila, en 1980.

La hispana epoko de "Heroldo" komenciĝos en aprilo aŭ majo 1979. Nenio ŝanĝiĝos en la aper-ritmo : ĉiuj 17 numeroj kaj la aldonaj suplementoj regule sekvos unu la alian : aparta klopodo estos farita por plibonigi la enhavon, i.a. per enkonduko de nova lingvo-rubriko por progresintoj.

La eldon-planoj ricevos novan svingon, ĉar la eldonejo "Heroldo" specialiĝos en la eldonado de altkvalitaj nacilingvaj Esperantaj lernolibroj, verkataj laŭ modernaj pedagogiaj kaj metodologiaj konceptoj de spertaj esperantistaj lingvo-instruistoj.

La du unuaj, nun finverkataj, estos angla kaj franca lernolibroj de William Auld kaj Emil Van Damme. La kvara eldono de "Paŝoj al Plena posedo" de W. Auld, la furora progresiga antologia lernolibro, estas nun preparata.

Do, la translokiĝo al Madrido praktike nenion ŝanĝas ĉe "Heroldo de Esperanto", escepte de tio, ke ĝi donos al ĝi novan vivon, novan impulson.

Komunikis Heroldo de Esperanto

---

## HIMNO AL LA SENKLASA MONDKOMUNECO

Teksto kaj Melodio de Martin Zimmermann — Kantebla ankaŭ laŭ Marseljezo

1) Vi homoj sur la tuta tero
Aŭskultu nian vokon nun,
Ni volas Pacon por eterno,
Ke neniu murdu iun !
Tial ni donu al ni manojn,
Por ke kresku la verko grand',
Kaj ĉiu estu batalant'
Por atingi la pacajn tempojn !
Refreno : Nun venos temp'ora,
La mondo senklasa !
Estas homara feliĉo
La senklasa mondo !

2) Al mondfamilio ununura
Formu la vicojn gefratoj !
Dubanto nombro estas nun granda
Pri sopiro de ĉiuj homoj !
Ni tamen volas montri pruvon
Ke jamprofetita vivo
Per ni fariĝos realo
Ke ĉiu amas proksimulon !
Refreno : Nun venas temp' ora,
La mondo senklasa !
Estas homara feliĉo
La senklasa mondo !


3) Ni ne konas apartajn rajtojn
Ne homojn riĉajn, malriĉajn,
Despotojn ne, ankaŭ ne sklavojn,
Sed homojn nur, tutegalajn !
Arogantecon kaj gvidanton
Ni ŝatas ne, kaj ne volas,
Diktaturojn ni malamas
Eĉ en malgranda terangulo !
Refreno : Nun venas temp' ora
La mondo senklasa !
Estas homara feliĉo
La senklasa mondo !

4) Al mondo sen klasa diverseco
Ni ĉiam celos kaj celis !
Ĝi estos sopirata paco,
Estas la tero-paradiz' !
Se interezojn ni rifuzas,
For estas ĉia sklaveco
Kaj militoj kaj malsato
Se ni l'profitismon ekstermas !
Refreno : Ĝi estas temp' ora,
Komuno senklasa !
Estas homara feliĉo
La senklasa mondo !

# Izabo III



Rekanto




1. Izabo jen promenas
Ĉe sia florĝarden' } 2 foje.



__Rek.__ Ĉe sia florĝarden'
Rande de l'insulo
Ĉe sia florĝarden'
Borde de la akvo
Borde de l'river'.

2. Tridekon da maristoj
Renkontis ŝi sur voj' } 2 foje.

__Rek.__ Renkontis ŝi sur voj
Rande de l'insulo......

3. El ili la plej juna
Kantadis ja kun kor' } 2 foje.
__Rek.__



4. Mi ŝatus tion lerni
Nun kion kantas vi } 2 foje.
__Rek.__

5. En bark', pinĉin', eksidu
Mi kantos ĝin al vi } 2 foje.
__Rek.__

6. Kaj en la nigra nokto
Izabo fuĝis for } 2 foje.
__Rek.__

# OLIVIER TZAUT

# POR KIAM LA DUA DISKO?

Dum la kongreso de Lektur la svisa kantisto Olivier Tzaut prezentis programon da kanzonoj kunlabore kun siaj infanoj. Li produktis en junio 77 la diskon "Tra l'mondo" kaj la Juna Penso petis de li, ke li respondu al demandoj en rilato kun tiu disko. Jen tiu intervjuo :

LJP. Olivier Tzaut, vi produktis antaŭ unu jaro vian unuan diskon. Kiel tia ideo venis al vi ?

O.T. Unue mi diros, ke en mia familio oni ĉiam multe kantis. Dum mia juneco mi studis violonon kaj solfeĝon. Pli poste mi ekstudis pianon kaj gitaron. Krome mi gvidas virĥoron kaj mi kantas en ĥoro. Ekde 1957 mi estas instruisto kaj ekde 1975 sekretario de kampanjo "Esperanto lernejen". En tiu lasta okupo mi konstatis, kiel estas malfacile trovi monon por nia laboro. Samtempe mi bedaŭris la mankon de bonkvalitaj diskoj en esperanto. Tial mi pensis, ke eble oni povus fari per unu ŝtono du pafojn : fari diskon, kiu propagandus por esperanto kaj samtempe alportus iom da mono.

LJP. Ĉu vi havis jam originalan repertuaron en esperanto ?

O.T. Jes, ĉar de 2 jaroj mi kantis kanzonojn tradukitajn de C. Piron el diversaj naciaj folkloroj kaj plurfoje aŭskultantoj jam diris al mi : "Kial vi ne faras diskon ?" Mi estis eĉ farinta kasedon kun nura gitara akompano kaj 100 el tiaj kasedoj estis jam venditaj.

LJP. Kial do vi volis fari diskon anstataŭ vendi nur vian kasedon ?

O.T. Ĉar mi opiniis, ke disko kun orĥestra akompano de fame konataj muzikistoj kaj plaĉa kovrilo havus pli da "prestiĝo" kaj pli da efiko en la publiko, ĉe la radiostacioj, ktp.. La kasedo estis laŭ mi tro "modesta" je tiu vidpunkto.

LJP. Je la momento, kiam vi decidiĝis por fari diskon, kiuj estis la problemoj ?

O.T. Ili estis multaj ! Mi devis trovi bonan aranĝiston, muzikistojn, studion, firmaon por presigi la diskon kaj ... monon. Mi estis tiam duonsalajrita kiel instruisto, ĉar mi laboris duontempe (kaj senpage) por esperanto. La mono, kiun mi gajnis apenaŭ sufiĉis por vivteni la familion. Farante diskon mi prenis do grandan riskon.

LJP. Ĉu vi ne povis prunti monon ĉe esperantistaj organizaĵoj ?

O.T. Jes, ĉe UEA, sed la komitato opiniis la aferon tro riska kaj nee respondis esprimante siajn bedaŭrojn.

LJP. Do kie vi trovis monon fine ?

O.T. Ĉe banko kompreneble dank' al la sindona helpo de kolego mia, kiu akceptis garantii la prunton.

LJP. Ĉu eblas demandi, kiom kostis la tuto ?

O.T. 33000 svisajn frankojn por 1500 diskoj kaj 500 kasedoj.

LJP. Kio pleje kostis ?

O.T. La "aranĝo" de la kanzonoj, la muzikistoj kaj la registrostudio.

LJP. Do kiom kostis fine unu disko (aŭ kasedo) enkalkulante ĉion ?

O.T. Estas malfacile tion diri, ĉar certaj elspezoj estas ankoraŭ farotaj, sed la minimuma prezo estis po 16.50 sv. fr., sen kalkuli la fakton, ke mi donacis pli ol cent diskojn por reklami, interalie ĉe radiostacioj.

LJP. Ĉu estis eble al vi fari profiton vendante la diskon, se oni konsideras vian bazan prezon ?

O.T. En Svislando, jes, sed eksterlande preskaŭ ne. Al multaj landoj mi vendas la diskon kun malprofito !

LJP. Kiam vi estos finvendinta la 2000 diskojn kaj kasedojn, ĉu vi estos almenaŭ paginta viajn ŝuldojn ?

O.T. Verŝajne jes, sed mi estos nenion gajninta !

LJP. Kion vi faros tiam ?

O.T. Mi ŝatus fari novan serion de la sama disko kaj vendi ĝin pli vastskale je pli malalta prezo. Ja en multaj landoj nur kelkaj diskoj aŭ eĉ neniu vendiĝis : la disko tro multe kostas.

LJP. Sed se vi vendas ĝin pli malmultekoste, vi neniam trovos la necesan monon por nova disko ?

O.T. Jes ja, sed oni devus tiam vendi multe pli da ili. Ĉu mi povas revi ?

LJP. Bonvolu !

O.T. Do, mi revu ! Se mi povus vendi 5000 kromajn diskojn aŭ kasedojn gajnante po 2 sv. fr., mi havus tiam 10000 fr. por nova disko.

LJP. Ĉu vi ne povus denove prunti monon ?

O.T. Ne, dankon ! Mi prenis dormigilon la unuan fojon. Jen sufiĉas : mi ne ŝatas dormigilojn !

LJP. Ĉu vi havus novajn kanzonojn por novaj diskoj ?

O.T. Ho jes ! Mankas nur mono !

LJP. Kion da diskoj / kasedoj vi vendis ĝis nun ?

O.T. Pli ol 1500. Ĉe mi restas proksimume 100 diskoj kaj mi atendas la pagon de pluraj centoj da ili.

LJP. Do vi tamen sukcesis. Malgraŭ sia alta prezo la disko bone vendiĝis, ĉu ne ?

O.T. Jes, sed mi ŝatus povi fari pli, iri pli rapide, sed mi devas atendi la aĉetantojn ! ...

LJP. Vi diris komence, ke unu el la celoj de via disko estis alporti monon por via poresperanta laboro. Ĉi-rilate vi malsukcesis ?

O.T. Jes, tute ! Ĝis nun ĝi alportis nur ŝuldojn !

LJP. Ĉu la dua disko, kiam ĝi naskiĝos (kaj se ĝi naskiĝos), kostos tiom, kiom la unua ?

O.T. Ne, mi ne volas. Mi deziras, ke la unua havigu al mi sufiĉe da mono por pagi la aranĝiston, la muzikistojn kaj la studion por la dua. Tiam mi ne bezonos pagigi al la aĉetontoj tiun prezon. Krome mi faris spertojn kaj mi scios, kiel ŝpari monon. Eble mi ne faros la duan en Svislando, kies franko estas tiel katastrofe alta ! Aliflanke mi kreis "Les Editions Musicales Olivier Tzaut", en esperanto "Muzika Eldonejo" por povi konsentigi pli interesajn prezojn ĉe disko-firmaoj. Mi esperas, ke tiu eldonejo havos kontentigan aktivecon.

LJP. Ĉu la esperantistoj ne grumblos, se ili vidos, ke la disko, kiun ili aĉetis antaŭ unu jaro kostas nun malpli.?

O.T. Eble kelkaj, jes. Sed tamen ili memoru, ke tio estas kutima fenomeno en la komerco ! Krome ili pensu je tio, ke ili riskis multe malpli ol mi kaj alportis valoran helpon al la esperantista diska merkato. Ili konsideru la kroman pagon kiel kontribuon absolute esencan !

LJP. Do kion konsili fine al la legantoj ?

O.T. Amase aĉeti la diskon, por si mem, por donaci, por sendi al la regiona aŭ nacia radio aŭ televido kun akompana letero. Poste instigi la esperantistojn, ke ili skribu al la stacioj por disaŭdigo de la disko. Ĉu tio ne eniras la kadron de la propaganda buĝeto ?

LJP. Olivier Tzaŭt, lasta vorto : por kiam la dua disko ?

O.T. La aĉetantoj de la unua mem decidu !

## DIALOGO PRI SEKSPERFORTO

- Tamen, fraŭlino, ĉu vi ne havas la impreson, ke vi iom responsas pri via seksperfortiĝo ?

- Kompreneble ; en nia kulturo, kiam seksumas viro kaj virino, kulpas la virino. Ankaŭ min tiel edukis mia patrino, la katolika eklezio, ktp, ktp. Tial restaĉas en neatingebla loketo de mia subkonscio neklara sento pri kulpeco.

- Mi ne volas diri tion. Sed, kial vi ne reagis, kial vi kondutis tiel pasive ?

- Mi ne kondutis pasive : mi parolis, nelaceme diris kaj rediris, ke mi ne konsentas.

- Ŝajne tiu alvoko al ilia konscienco ne sukcesis ...

- Atendi sukceson de alvoko al la konscienco de du viroj tuj spermelĵetontaj postulas monaĥinan naiveco, kiun mi ne plu havas. Ne, mi alvokis al nenio, mi provis iom veneni ilian plezuron, pro ina fiereco, aŭ por ke la afero daŭru pli mallonge.

- Ĉu kun sukceso ?

- Unu el ili minacis frapi min, nur pro tio, ke mi parolis. Sed li ne faris, kaj li seksumis ĝenate. Eble la fiero esti ĝuiganta virinon estas necesa al kompleta vira plezuro. Tion mi ne scias.

- Sed kial vi nur parolis, kial vi ilin ne batis, ungovundis, mordis, mi ne scias ... ?

- Ĉar mi ne estas masoĥista : ili estis du, viroj estas pli fortikaj ol virinoj, kaj mi estis enŝlosita. Komence mi serĉis la ŝlosilon, por provi eskapi, sed ĝin ne trovis. Poste mi rigardis tra la fenestro, ni estis en la subtegmenta etaĝo, morti por gardi sian honoron estas admirinde ... en romano ! Mi sukcesis eliri el tiu domo vivanta, ne vundita kaj kun vestoj ne ŝiritaj, tio estas la nura sukceso, kion oni povas esperi en tia situacio. Kompreneble, mi tuj vizitis ginekologon. Mi diris : "Doktoro, mi volas, ke vi ekzamenu min, sekve de seksperforto". Li tuj demandis : "Ĉu vi petveturis ? " kaj informis min, ke petveturantinoj tre ofte estas seksperfortataj, kaj rakontas tion nur al ginekologoj. La lasta, kiun li vidis antaŭ mi, estis 15-jara kaj graveda. Mi ne demandis, ĉu li antaŭvidas aborton. Do li ekzamenis min kaj tuj diris al mi, ke mi ne estas vundita. Ke mi ne estas graveda, tion mi sciis, ĉar mi havis miajn menstruojn. Kelkajn tagojn poste, la rezulto de la laboratoriaj analizoj konfirmis, ke mi ne malsaniĝis. Se mi batus, ungovundus aŭ mordus ilin tutcerte la rezulto estus pli plorinda.

- Jes, sed mi emas diri kiel via ginekologo : kial vi akceptis eniri en tiun veturilon, kaj poste, en la domon ? Vi estis tiom malprudenta ...

- Ke mi kulpas pri tio ! Finu vian frazon, sinjoro ! Vere, ĉu virino, ĉiam, en ĉiuj cirkonstancoj, povas resti prudenta, sen iam fari eraron ? Mi estis tiam tre nervoza pro miaj menstruoj, kiel kutime, kaj ne kapablis rezoni tute klare. Mi volis viziti amikon sur la kamparo, kaj petis lin per letero, ke li atendu min en stacidomo de la plej proksima urbeto. Sed li ne ricevis la leteron. Mi atendis lin dum unu horo, pli kaj pli nervoza. Poste mi serĉis restoracion en la urbeto, sed ĉiuj estis ŝlositaj, dimanĉe oni ne povas manĝi en urbeto, kaj tio pli nervozigis min. Finfine mi trovis kukejon kaj manĝis grandan kukon, ion alian mi ne povis trovi. Poste mi serĉis taksion por iri al la amiko, sed dimanĉe oni povas ankaŭ ne veturi. Finfine alparolis min du viroj : "Ĉu vi serĉas ion ? " "Ĉu estas taksio en tiu damnita urbo ?" "Ne, ne estas, sed venu kun ni, ni veturigos vin". Mi akceptis. Ĉu akceptihelpon, kiam oni estas tute nervoza, perdita en nekonata urbeto, estas ĉe juna virino krimo indas je perforta puno ?

- De tio vi almenaŭ lernis prudenton ...

- Eĉ ne ! En Alzaco, dum la kristnaska vespero, ne veturas aŭtobusoj, aŭtobusistoj ĉesas la laboron je la oka por povi festi kun siaj familioj. Tion mi ne sciis. Iun 24n de decembro vespere, mi volis iri trajne al Laroque-Timbaut, kaj kiel kutime atendis aŭtobuson. Pasis nigrulo : "Vi povus atendi ĝis morgaŭ matene, ne plu venos aŭtobusoj " Do mi prenis mian valizon kaj iris piede al la stacidomo, tio postulas unuhoran marŝadon. Alparolis min viro promeniganta sian hundon "Ĉu vi tiel iras malproksimen ?" "Jes, al la stacidomo" "Kompatindulino, vi ankoraŭ ne estas alveninta" "Ne gravas, la trajno ne forveturos antaŭ meznokto, restas tri horoj" "Do venu en mian domon, kaj poste mi veturigos vin".

- Kaj vi eniris la domon ?

- Jes, mi sekvis la viron kaj la hundeton.

- Kia malprudentego ! Kaj kio okazis ?

- Li prezentis al mi sian edzinon, kaj informis pri mia alveno sian bopatrinon, kiu kuŝis en lito. La edzino preparis teon, kaj ni manĝis kune kuketojn. Poste li kaj la edzino veturigis min al la stacidomo.

- Vera kristnaska fabelo ! Tamen, kia malprudento !

- Kara sinjoro, se marŝante kun mia valizo en la strasburga nokto, mi estis perfortita de strataĉuloj, vi certe dirus al mi "Kia malprudentego ! Piediri sole en la nokto ! Ĉu ne estis veturilo ? Konfesu, ke vi responsas pri tiu seksperfortiĝo" Kiel kutime ! Kion do mi devas fari ? Se mi promenus envolvita de la kapo ĝis la piedoj en nigra vualo, kiel postulas la irana religio, mi riskus malpli. Ĉu tion vi konsilas al mi ? En kelkaj landoj, virinoj vivas enŝlositaj hejme, kie perfortas ilin nur iliaj leĝaj edzoj. Ĉu tian vivon vi deziras al mi ? Mi estas juna okcidenta virino, kaj deziras vivi libere. En Okcidentio, se virino havas nek edzon nek veturilon, ŝi riskas agreson. Kaj, se ŝi estas agresata, kulpas ŝi, ĉar ŝi ne devis iri piede kaj sole. Ĉiam kulpas virino.

- Tamen, kun la feminista movado ...

- Iam mi volis iri al staĝo okazonta en centro, kiu organizas renkontojn pri variaj temoj, inter-alie pri batataj aŭ perfortataj virinoj. Mi alvenis per trajno al la stacidomo plej proksima, 12 km de la renkontejo, kaj telefonis, ke iu venu kun veturilo. Juna ina voĉo respondis al mi "Ne estas nun veturilo disponebla, alvenu per petveturado" "Mi ne volas, mi jam estis seks-perfortata petveturinte" "Ci fabelemas, ci riskas nenion : mi faris tion tre kutime" "Ne, mi ne volas". Ŝi lasis min en la stacidomo, neniu venis, je la 9a vespere mi telefonis al miaj gepatroj, ke ili serĉu min en stacidomo ne tro malproksima de sia loĝloko. Poste mi skribis leteron al la renkontejo, klarigante, ke la tagon de mia seksperfortiĝo estis malpli ol 12 km inter la stacidomo kaj la farmodomo de mia amiko, kiam alparolis min ĉarmaj junuloj, ktp, kaj mi petis la repagon de la mono, kiun mi antaŭpagis por la staĝo. Mi ankoraŭ atendas tiun monon. Se okazos en tiu renkontejo feminista kunveno pri seksperforto, mi certe ne ĉeestos.

- Tio eble estas escepto.

- Tute ne ! Ĉiam, kiam mi diras en feminista medio "Mi ne volas petveturi pro timo", feministinoj respondas "Ci fabelemas" kaj mokas. Nur viroj reagis respondante "Ekskuzu min, mi ne pensis pri tiu problemo. Ni serĉu alian solvon". Kaj ĉiam, kiam mi diras, ke mi estis seksperfortita, oni riproĉas al mi mian malprudenton.

- Do, konsentite, vi ne kulpis. Sed, diru al mi, kial poste vi ne plendis ĉe la polico ? Ĉu tio ne estis posta konsento pri via sorto ?

- Tio estis logika konduto.

- ?

- Provu klarigi al mi per raciaj argumentoj, kiun avantaĝon havigus al mi la malliberiĝo de tiuj viroj ?

- Tamen, fraŭlino, se mi estus agresita de du aĉuloj, se ili batus min kaj lasus min kun tri ripoj frakasitaj sur la trotuaro, mi poste ĝojus, ke oni metus ilin en malliberejon.

- Tion viro jam diris al mi. Sed mi ne scipovas ĝoji pri alies sufero. Kion donus al mi ilia malliberiĝo ? Tute nenion ! Mi rifuzas la rolon de viktimo, kiun juĝistoj kaj feministinoj volas trudi al mi. Pli ĝuste, jen mia koncepto pri tio : en tiu afero, jam estas unu viktimo : mi ; kial la socio aldonus du pliajn viktimojn per siaj karceroj ? Tio ne estas mia persona profito.

- Tamen, tiuj viroj ne precize faris al vi plezuron ...

- Korpe, jes. Tio estis natura reago de mia korpo, pri kio mi ne responsas, kaj do ne hontas. Sed mia menso tute ne partoprenis en tio. Ili uzis mian vaginon kiel ilon por sin masturbi, mi havas nenion por fari kun ili. Mi ne suferis korpe, tute ne, sed suferis psike per sento de angoro pro tuta senpoveco : kiam ili kuŝigis min sur la liton, mi sentis min en la situacio de cervino antaŭ la unua mortigfrapo de la ĉasistoj : estas nenio, kion ŝi povas fari por eskapi

sian sorton, neniu, kiu povas helpi, la katastrofo estas nepra kaj tuja. Post la ago, mi havis nervan krizon kaj ploregis. La viro, kiu antaŭe minacis frapi min, ĉar mi parolis, provis min konsoli, donacis al mi sian foton kaj du diskojn de sia lando, kaj skribis al mi siajn nomon kaj adreson, por ke mi poste skribu al li.

- Ĉu por ekskuzo ?

- Ne, pro pruvo mensogi al si mem. Tiu viro ne estis sufiĉe aĉa por akcepti sin kiel seksperfortinton, tial li kondutis kun mi kiel kun konsentinta virino, por provi mem kredi al tiu fabelo. Sed tio estas lia problemo, ne mia. Mia estas, ke mi jam faris psikoterapion, interalie pro antaŭa, knabinaĝa seksperfortiĝo, kaj ĝi daŭros pli longe, pro tiu nova angoro, kiun li kaj lia amiko metis en min.

- Kaj vi ne deziras, ke tiuj viroj pagu pro sia ago ?

- Jes ja ! Se oni kondamnus ilin pagi per sia laboro la salajron de la psikiatrino, kiu zorgas pri mia psikoterapio, mi opinius tiun punon justa kaj racia. Sed ne ĝin antaŭvidas la punleĝaro. Ĝojinde, mia psikiatrino estas salajrata de la reciproka asekura asocio de edukistoj, do mi nenion pagas. Kion donus al la asekura asocio la malliberiĝo de la kulpintoj ?

- Ĉu al tiu nevenĝemo ne instigas vin viaj kristanaj konvinkoj ? Pardonemo, suferemo ...

- Mi neniam komprenis, kial raciistoj blinde kredas, ke religia konduto nepre devas esti malracia. Se mi kapablus pardoni al tiuj viroj, pensi pri alia ago senpasie kaj senemocie, tio estus la signo, ke mi sukcesis resaniĝi el la psika traŭmo, kiun ili trudis al mi. Mi ne kapablas pardoni, ĉar mi estas ankoraŭ malsana. Kiam mia vida memora reprezentas al mi la vizaĝojn de tiuj du viroj, mi emas vomi. Kvazaŭ mia korpo plu enhavus ilian stampon, kaj volus ĝin forvomi. Mi ne kapablas pardoni al ili, ĉar mi plu estas malsana, kaj pro tiu malsano mi suferas. Ne pro honto mi decidis ne plendi, sed mi sentas nebremseblan deziron ne plu havi ian ajn rilaton kun ili, eĉ ne malamikan. Ili iru pendiĝi en alia loko, kaj oni lasu min en paco pri tiu afero.

- Tamen, fari nenion ...

- Mi faris ion : mi skribis al la viro, kiu donis al mi sian adreson, provante klarigi al li, kion suferas seksperfortita virino aŭ knabino.

- Do ankoraŭ alvoko al la konscienco !

- Mi finis la leteron menciante, ke mia patro estas ekspolicoficiro, kaj ke en Francio seksperforto estas punebla per 10 ĝis 20 jaroj da mallibero. Mi klarigis, ke, se la virino ne povas pruvi la kulpon, oni ne povas kondamni, sed ke la polico bezonas nek kondamnon nek klarigon por forpeli gastlaboriston el Francio. Mi konkludis konsilante al li ne rekomenci.

- Timo estas la komenco de saĝeco ! Ĉu vi konis lian reagon ?

- Li respondis al mi, ke li ne komprenas, kial mi ne estas ĝentila.

- Nekredeble !

- Faktoj ne ĉiam estas kredeblaj. Advokatino Halimi konas sian profesion, sed havas grandajn teoriojn pri seksperfortantoj, kiuj tute ne respondas al la realo, kian mi ĝin spertis. Se ŝi konvinkus la tribunalon, ke oni devus decidi modelan punon, tiu viro irus al la karcero, sen kompreni kial. Jen la vero. Mia decido ne plendi ĉe la polico estis kristana kaj racia konduto, pri kiu mi pretas argumenti politike. Kamarado skribis al mi, ke mi kondutis proksimume kiel anarkiistino.

- Aŭ kiel ekstersociulino ! Rifuzi socion kun karceroj estas bela idealo, sed, ĉu vi pensis, ke tiuj viroj, kiujn vi lasis liberaj, povus perforti alian virinon ?

- Kompreneble, se mi ekscius, ke ili poste perfortis knabinon, mia konscienco ne estus tute pura. Sed ni argumentu racie : kio povus okazi, se mi plendus al la polico ? Oni arestus almenaŭ tiun, kiu malprudente donis al mi sian adreson. Sinjorino Halimi bele pledus antaŭ la 9 sinjoroj de la ĵurio, kaj konvinkus ilin kondamni tiun viron al 8 jaroj da mallibero, kiel fakte okazis en Kolmaro. Aŭ eble pli, se ili estus rasistoj. Sed ni diru 8. Do li retrovus sin en malliberejo.

- Tie li seksperfortus neniun !

- Ne kredu tion ! Seksperfortoj, kompreneble samseksaj, estas oftaj en malliberejoj. Monaĥoj mem elektis sin enŝlosi en nur viran medion, kaj helpas ilin ilia religia idealo. Malliberuloj elektis nenion, kaj havas nenion por ilin helpi. Inter ili, kutimaj estas samseksaj rilatoj, konsentitaj aŭ ne. Sed ni supozu, ke tiu viro abomenus samseksemon, preskaŭ ĉiam kondutus laŭregule (tute ĉiam ne eblas!), ĉiam servuteme obeus la gardistojn, de temp' al tempo denuncus siajn kunulojn por esti bone konsiderata de la direktoro, mallonge : bone kondutus. Oni konsentus al li redukton de la puno. Tamen, ĉe puno de 8 jaroj, oni ne povas esperi resti en la malliberejo malpli ol 5 jaroj. Ni diru : 6 jaroj. Do, dum 6 jaroj tiu viro vidis neniun virinon (krom eble la socia zorgantino de la malliberejo). Kaj, post 6 jaroj, de tuta seksa manko, li retrovas sin sur la trotuaro. Li marŝas en la urbo, sen scii, kien iri. Li rigardas la afiŝojn de kinejo kaj vidas la fotojn de "Junulinoj en internulejo", "la diablo en la monaĥinejo", aŭ samstilaj filmoj. Sed li ne havas monon por eniri. Li vidas ankaŭ reklamajn afiŝojn. Pri mamzonoj. Pri ŝtrumpoj. Aŭ pri fritataj terpomoj. Kiam mi iris al la liceo, estis sur la vojo granda afiŝo kun bela, juna, blonda virino, skandinave ĉarma, plej mallonge vestita, manĝante frititajn terpomojn. La teksto estis "Krakmanĝinde blondaj". Do tiu viro, kiu ne vidis virinon dum 6 jaroj, rigardas tiun sugestan afiŝon. Precize tiam pasas sub la afiŝon iu blonda verdĉapulineto, kaj li estas tre krakmanĝema. Ĉu la sekvon mi devas desegni por ilustri LJP ?

- Vi fabelemas !

- Jes, mi scias, tion oni jam diris al mi. Ankaŭ viroj estas fabelemaj ...

- Tiu viro havus tempon en la karcero por pensi pri sia ago.

- Fabelemas vi ? Ni revenu al la realo ! Tiu viro ne komprenas, kial mi ne estis ĝentila. Eble li estas escepto (li ne estas stulta : li bone skribis la francan). Sed eble ĉiuj seksperfortintoj pensas same : mi ne kulpas, funde de si ŝi atendis nur tion. Kiel juna virino, mi estas oftege alparolata surstrate de junaj aŭ ne junaj viroj. Pri mia rifuzo amori kun ili mi jam aŭdis plej variajn klarigojn : mi estas fidela al fianĉo, mi estas katolika, mi estas rasista, mi estas laca, mi havas miajn menstruojn, punus min mia patro, ktp, ktp. Neniam mi aŭdis la klarigon "Jes, mi komprenas : vi ne deziras amori kun mi". Viro, kiu deziras amori kun mi ĉiam pensas, ke mi deziras nur tion, sed rifuzas kontraŭ mia emo pro iu aŭ alia motivo. Ĉu almenaŭ unu virinon havas malan sperton ?

- Vi troigas !

- Neniel ! Mi skribis artikolon en LKK, kie mi klarigis, ke mi estis seksperfortita kiel knabino, kaj poste kiel virino. Sekve de tio, SAT-ano el Bonaero skribis al la gazeto "mi ŝatus seksperforti k-inon Lépeix", kaj sendis al mi kopion de tiu letero, petante mian foton. Certe li pensis, ke mi sentos tion kiel komplimenton. Sed mi revenu al mia seksperfortinto. Kial li perfortis min ? Pro sia seksa mizero. Al kio mi devas, laŭ vi, kondamnigi lin ? Al pluraj jaroj da seksa mizero. Kaj por kio ? Por ke li ne plu seksperfortu. Ĉu ne estas difekto en via logiko, sinjoro ? La loko, kien li kondukis min, estis hejmo por gastlaboristoj. Por la seksperforto alvenis amikoj por vizito, nur viroj, neniu virino. Unu el la viroj petegis min "Amoru kun mi !". Eble ĉiuj el tiuj viroj ne seksumis dum monatoj.

- Kaj vi kompatas pri ilia sorto.

- Kial ne ? Kiel mi diris, la memoro pri la du, kiuj perfortigis min, vomemigas min. Sed pri malliberuloj mi povas kompati, pro tio, ke ankaŭ mi estis mallibera, kiam oni enŝlosis min en psikiatriejon pro la longdaŭraj konsekvencoj de la knabinaĝa seksperforto. Mallibero ne estas tio, kion kredas liberaj homoj. Ne ĝenis min la fakto, ke mi ne povis kuri ekstere. Turmentis min la fakto, ke estis nenio por fari interne. Matene je la 7a alvenas la kafo. Je la 11a alvenas la supo. Je la 3a alvenas la dua kafo. Je la 5a alvenas la dua supo. Inter tiuj regulaj, antaŭviditaj neŝanĝeblaj faktoj, okazas NENIO : oni atendas. Krom la manĝoj, estas nenio konkreta por atendi. La cikla reveno de la kvar manĝoj, ĉiam je la sama horo, sen iam ajn ia ajn ŝanĝo en la vivo, rapide perdigas al oni la senton pri la tempo forpasanta. Mi rekomendas tiun sperton al kredantoj al eternaj punoj. Post unu monato de tiu malplena atendo mi ne povis elteni, mi fuĝis. Jarojn de tiu planta vivo mi eĉ ne kapablas imagi. Barono Empain estis forrabita. Poste la polico liberigis la baronon kaj arestis la forrabintojn. Ĉe intervjuo, la barono diris "Estinte mallibera, mi kompatas al tiuj homoj, kiuj estas nun en karcero".

- Malfacile komprenebla reago.

- Malfacile komprenebla de homoj, kiuj ĉiam estis liberaj. Pli ol venĝemo, ekzistas inter malliberuloj iun senton de frateco. Eĉ en tia situacio. Cetere, mi povas kompreni la situacion de seksa mizero, en kiu vivas gastlaboristoj. Tahar Ben Jelloun skribis pri tio libron en franca lingvo. Kelkan tempon post mia seksperfortiĝo, mi eksciis, ke la franca registaro malpermesas al gastlaboristoj venigi siajn edzinojn al Francio. Senĉese oni parolas al mi ĉe radio kaj gazetoj pri la neceso dungi pli da policistoj por protekti min kontraŭ perforto. Ĉu tio estas racia ? Gastlaboristo rajtas amon kaj sekson unufoje po jaro, kiam li vidas sian edzinon en la hejmlando, kaj faras al ŝi novan infanon por la Tria Mondo. Dum la resto de la jaro, li estas en mondo malamika, kaj ne seksumas. Se li seksumas kun francino, li retrovas sin en karcero. Kaj feministinoj volas, ke tian politikon mi subtenu per mia plendo.

- Tamen, kara fraŭlino, estas aliaj manieroj amori ol ...

- Simpla demando, estimata sinjoro : ĉu vi ŝatus, ke via filino amoru kun turko ?

- Kial ne ? Mi ne estas rasisto.

- Tiel ne respondus la plimulto de la francoj. Nek la plimulto de iliaj filinoj

- Sed estas aliaj rimedoj ...

- Jes, estas virinoj salajrataj por solvi tiun viran bezonon. Deputito ĵus faris leĝproponon : tiuj virinoj laboru en publikaj domoj kontrolataj de la municipoj (tiaj "amorejoj" ekzistas ekzemple en Federacia Germanio). Baldaŭ ne plu estos ĉe ni bordelistoj, estos respektindaj municipaj oficistoj.

- Kiun solvon vi proponas ?

- Mi ne havas solvon en mia maniko ! Seksa mizero estas problemo. La mizero de gastlaboristoj estas problemo. La mizero de malliberuloj estas problemo. La mizero de prostituinoj estas problemo. La mizero de batataj aŭ perfortitaj virinoj estas problemo. Laŭ mi, tiuj problemoj ne solviĝos aparte, sed nur per la kuniĝo de ĉiuj mizeruloj. Tial mi ne povas aprobi feministinojn, kiuj volas solvi sian problemon per polico. tribunaloj kaj jaroj da karcero. Laŭ mi, socio, kie oni respektus la virinojn, ankaŭ estus socio, kiu ne plu malliberigus homojn.

- Socio sen karceroj, ĉu tio eblas ? Ĉu ne utopio ?

- Probable neperforta socio estas nur utopio. Sed, tiukaze, por utopio sinjorino Halimi enkarcerigas homojn. Oni ne malliberigu homojn por utopio, ĉar karcero estas realo. Karceroj ne solvas, sed maskas la problemojn. Malliberiĝo de individuoj ne povas alporti liberiĝon al la socio. Krom kristana pardonemo aŭ virina kompatemo, tio estas politika konvinko, kiu ŝajnas al mi, okulfrapas per sia racieco.

- Ĉu tiel ni konkludu ?

- Mi spertis, kio estas mallibero. Mi spertis, kio estas seksperforto. Kaj mi ne bedaŭras, ke mi ne malliberigis seksperfortintojn. Ĉiu konkludu, kiel ŝi aŭ li volas...

Jacqueline LEPEIX

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

RADIO-ROMA Elsendoj en Esperanto (al Nordeŭropo, dimanĉe, 2000-20.20)
Frekvencoj/Ondolongoj dum la periodo septembro-oktobro 1979: kHz/m:
11800/25,42 9710/30,90 7275/41,24

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Nova Esperanto-prospekto:

La Turisma Oficejo en Nancy ĵus eldonis novan 10-paĝan ilustritan belaspektan prospekton tute en Esperanto. Ĉiu interesato povas ricevi ĝin senpage. Nancy situas en Nordorienta Francio, ĝi estas eŭropa vojetapo inter Benelukso aŭ Germanio kaj Mediteraneo unuflanke, aŭ inter Benelukso kaj Svislando, aŭ Germanio kaj Parizo aliflanke. Nancy posedas interesajn muzeojn kaj monumentaron de la 18-a jarcento, kaj ĝi estas alirpunkto por belegaj ekskursoj. En tiu urbo naskiĝis La Juna Penso. Antaŭ ol viziti Nancy, avertu la lokajn Esperanto-delegitojn.

Por ricevi la prospekton, oni turnu sin al: Turisma Oficejo, 14 Place Stanislas, F 54000 NANCY. Tel:(28)35.22.41.

# Pola Skoltismo

Konforme al la statuto de Federacio de Socialismaj Asocioj de Pola Junularo ununura junulara organizaĵo por baz- kaj mezlernejoj estas Asocio de Pola Skoltismo. APS estas organizo amasa, idea-politika kun universala agadkaraktero, kies celo estas organizi junularon al la aktiva partopreno en socialisma konstruado kaj pretigi al krea obligado de sociekonomiaj akiroj de Popola Pollando. La programon realigas lernejaj instancoj de APS nomataj gentoj (pole : szczep).

La gento je la nomo de Krysztof Kamil Baczynski ekzistanta ĉe II GL kaj ampleksanta pli ol kvaronon de la lernantaro faras riĉan kaj multflankan agadon : turisman-agadinstruan (bivakoj, tendaroj, ralioj), porsocian (laboroj porsociaj, helpakcioj), kulturan (temaj renkontiĝoj, vesperkunvenoj), idean (sesioj, mitingoj, alertoj). Por disvolvigadi kaj pliprofundigi interesiĝojn de gelernantoj servas aniĝeblaj por ĉiuj Skoltaj Specialecaj Kluboj. Distingiĝas ĉi tie jenaj : "Politicus", de Junaj Arkeologoj kaj E-Klubo.

La Esperanta Skolta Specialeca Klubo organizas : E-kursojn, temajn klubkunvenojn, naciajn vesperojn kaj mitingojn. Gi kunlaboras kun eksterlandaj esperantaj organizoj (antaŭ ĉio el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, GDR, Hungario kaj Sovetunio), kun PEA, kun Pola Studenta Esperanto Komitato de Socialisma Asocio de Polaj Studentoj kaj kun aliaj ESSK-oj en Pollando. La Klubo aktive partoprenas en laboroj de Media Koordina Teamo de ESSK-oj en Poznan.

Oni povas distingi organizatajn far la ESSK ĉe II ĜL : Latinamerikan Mitingon, Grekan Vesperon, Sesion pri nealfabetaj skribsistemoj. Tamen plej grava ĝia aranĝo estas Internacia Skolta Tendaro AGORA, pitoreske situita, kun varia kaj interesa programo por la internacia partoprenantaro el multaj landoj.

Laboron de la Klubo en II ĜL gvidas jenaj fundamentaj principoj de esperanta agado de junularaj organizaĵoj :

1. La fonto kaj principa celo de esperanta agado de junularaj organizaĵoj estas formi kaj disvolvi inter la junularo patriotismajn kaj internaciismajn sintenojn baze de esperanto.
   - Formado de internaciisma mondkoncepto estas nedisigeble ligita kun pliprofundigado de la kono de aliaj nacioj, popoloj kaj kulturoj, kun disvastigado de la ideo pri frateco de ĉiuj popoloj kaj nacioj, kun batalo por la paco kaj por paca kunekzistado de nacioj.
   - Patriotismo ligendas kun profunda kono de la kulturo, tradicio kaj historio de sia nacio, kun konscio de sia nacia aparteneco, kun krea partopreno en la vivo kaj kulturo de la nacio, kun fiero el ties akiroj, kun oferemo kaj engaĝiteco en aferojn kaj sortojn de la patrujo, kun strebado al ties inda kaj respondeca reprezentado.
   - Nocioj de patriotismo kaj de internaciismo estas kun si nerompeble ligitaj.
2. Fundamento de esperanta agado de junularaj organizaĵoj estas utiligo de esperanto al la celoj kaj bezonoj de tiuj organizaĵoj kaj antaŭ ĉio al diversaj internaciaj kontaktoj.
3. Baza temo senpere ligita kun esperanto estas la problemaro de internacia lingva komunikado t. e. problemoj de teorio kaj praktiko de funkciado de internaciaj lingvoj, naturaj kaj sintetikaj (ekz. esperanto).

Paweł Janowczyk
Zbigniew Kornicki

# LA 'TESTAMENTO' de Raoul FOLLEREAU

## KIEL UNIVERSALAN HEREDONTON MI NOMAS.....

Gejunuloj de ĉiuj landoj,
la milito, la paco
estas via afero.

Mi skribis, antaŭ dudek kvin jaroj:
'aŭ la homoj lernos ami unu la alian,
aŭ la homo, fine, vivos por la homo,
aŭ la homoj pereos.

Ĉiuj,
kaj ĉiuj kune.

Nia mondo plu havas nur tiun alternativon :
ami unu la alian aŭ malaperi.

Necesas elekti. Tuj. Kaj por ĉiam'.

Hieraŭ alarmo.

Morgaŭ infero.

La Grandaj Potencoj - tiuj gigantoj, kiuj ne plu estas homoj - posedas en siaj hontindaj arsenaloj de mortigo 20.000 hidrogenajn bombojn, el kiuj unu sufiĉus por krei el metropolo vastegan tombejon. Kaj ili daŭrigas sian monstran produktadon je ritmo de tri bomboj ĉiutage.

La Apokalipso tuj proksimas.

Junuloj, junulinoj en la tuta mondo,
estas vi, kiuj diros 'Ne!' kontraŭ
la sinmortigo de la homaro.

'Sinjoro, mi tiom volas helpi, ke la aliaj vivu.'Tio estis mia preĝo kiel aldoleskulo. Mi kredas ke, dum mia tuta vivo, mi restis fidela al tio...

Kaj jen mi en la vespero de vivo, kiun mi antaŭenpuŝis laŭ miaj kapabloj sed kiu restas nekompleta.

La trezoro, kiun mi lasas al vi, estas la bono, kiun mi ne faris, kiun mi volus esti farinta, kaj kiun vi faros post mi.

Ke tiu ĉi deklaro nur helpu al vi ami.

Tio estas la lasta ambicio de mia vivo, kaj la celo de tiu ĉi 'testamento'.

Kiel universalan heredonton mi nomas la junularon de la mondo.

La tutan junularon de la mondo: dekstre, maldekstre, centre, plafone - ne gravas.

La tutan junularon: tiujn, kiuj ricevis la donacon de la kredo, tiujn, kiuj faras kvazaŭ ili kredus, tiujn, kiuj kredas ke ili ne kredas. Ekzistas por ĉiuj nur unu ĉielo.

Ju pli mia vivo proksimiĝas al sia fino, des pli mi sentas la devon rediri al vi tion: amante ĝin ni savos la homaron.

Kaj ripeti ankaŭ tion: la plej grand malfeliĉo, kiu povus trafi vin, estus utili al neniu, ke via vivo utilus por nenio.

Ami unu la alian aŭ malaperi.

Sed ne sufiĉas bleki 'Pacon!' por ke la Paco ne plu forlasu la teron.

Necesas agi. Pro amo. Per amo.

La pacistoj kun klabo estas falsaj batalantoj. Klopodante venki, ili perfidas la aferon. Kristo rifuzis perforton, kiam Li alprenis la Krucon.

Disigu vin de tiuj intelektaj ĉarlatanoj, kaj de la kolportantoj de fantaziaĵo, ili kondukos vin sur vojojn senflorajn, kiuj finiĝas en la abismo.

Suspektu tiujn 'diigitajn teknikaĵoj kiujn denuncis jam Sankta Paŭlo. Distingu inter tio kio servas kaj tio kio servutiga

Rezignu pri vortoj kiuj estas ankora pli belsonaj ol senenhavaj.

Vi ne kuracos la mondon per krisigno

Necesas ĝin savi kontraŭ iuj'progres kaj ties malsanoj, kontraŭ la mono kaj ties malbeno.

Disigu vin de tiuj kiuj ĉion resuma klarigas kaj taksas per monbiletoj. Eĉ se inteligentaj, ili estas la plej stultaj el ĉiuj homoj.

Ne per la mono oni povas eksalti al nova mondo.

Vi devos superregi la monon, sen kiu eblas preskaŭ neniu homa afero, sed per kiu putriĝas ĉio.

Tiu koruptanto fariĝu servanto.

Estu vi riĉaj je la feliĉo de la aliaj.

•

Restu vi mem. Kaj ne iu alia. Kiu ajn, tio estas neniu. Fuĝu la poltronan dolĉon de anonimeco.

Ĉiu estaĵo havas sian unikan destinon. Plenumu la vian, kun okuloj klarvidaj, postulemaj kaj lojalaj. Neniam io ajn povas egali la homan dimension. Se mankas io al via vivo, do pro tio,ke vi ne celis sufiĉe alten.

Ĉiuj similas? Ne.

Sed ĉiuj egalas
kaj ĉiuj kunekzistas.

•

Vi do estos homoj. Liberaj homoj.

Sed atentu!

La libereco ne estas servistino por ĉio, kiun oni povus laŭplaĉe ekspluati. Nek iu mirmiriga ekrano, malantaŭ kiu ŝvelas fetoraj ambicioj.

La libereco estas la komuna heredaĵo de la tuta homaro. Kiu ne kapablas laŭdi ĝin ĉe la aliaj, tiu ne dignas mem posedi ĝin.

Ne faru tiel, ke via koro estu malferma por ĉio; ĝi tre baldaŭ fariĝus rubujo.

Laboru. Unu el la malbenoj de nia epoko estas, ke ĝi konsideras la laboron malbeno. Dum ĝi savas el malbeno.

Meritu la feliĉon ami vian devon.

Kaj kredu je la boneco, la humila kaj sublima boneco.

En la koro de ĉiu homo ekzistas amtrezoroj. Vi devas ilin eksterigi.

La sola vero estas, ami unu la alian.

Ami unu la aliajn, ami reciproke ĉiujn. Ne je specifaj horoj, sed dum la tuta vivo. Ami la mizerulojn, ami la feliĉulojn (kiuj ofte estas ankaŭ kompatindaj mizeruloj), ami la nekonaton, ami la proksimulon en plej fora parto de la mondo, ami la fremdulon tuj apud vi. Ami.

•

Vi paciĝos la mondon nur riĉigante ĝian koron.

Atestantoj tro ofte katenitaj de la putriĝo de tiu ĉi jarcento (kiu estis je momentoj tiom bela), terurite de tiu grandega mortkonkurso far tiuj, kiuj senigas nin je niaj destinoj, sufokate pro fulmrapida, ĉion englutanta, sed duonlama 'progreso'

korŝirite pro la krio 'Mi malsatas!, kiu leviĝas senĉese el du trionoj de la mondo, ni plu havas nur tiun solan rimedon plej altan kaj subliman : esti vere fratoj.

•

Kaj.... morgaŭ ?

Morgaŭ, estas vi.

-----ooooo-----

Donacojn por la leprulojn bonvolu sendi al :
Asocio Luksemburga de la Fondaĵoj
Raoul Follerau Luksemburgo
Sidejo: 3, Place du Théâtre - Tel 2 55 33
Sekretariejo:110,ave. Gaston Diderich
Telefono 4 0302 - Poŝtĉekkonto: 7878

-----ooooo-----

Glumarkojn "Helpu al la leprulojn!"
bonvolu mendi ĉe:
D-ro Jozefo Kondor
Alte Schlosstrasse 25
D-5450 Neuwied 21, Engers
Telefono 02622/2597

## NIA ALFABETO

| Antikva fenica | Moderna hebrea | Responda litero latina | greka | rusa | Nomo | Signifo en la fenica lingvo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 𐤀 | א | A | A | А Я | Alef | bovo |
| 𐤁 | ב | B | B | Б В | Bet | domo |
| 𐤂 | ג | C G | Γ | Г | Gimel | kamelo |
| 𐤃 | ד | D | Δ | Д | Dalet | tendopordo |
| 𐤄 | ה | E | E | Е Э | He | baro |
| 𐤅 | ו | F V | (Ϝ) | У | Vav | hoko |
| 𐤆 | ז | Z | Z | З | Zajin | glavo |
| 𐤇 𐤇 | ח | H | H | И | Ĥet | ĉirkaŭbaro |
| 𐤈 | ט | — | Θ | Ѳ | Tet | serpento |
| 𐤉 | י | I | I | I Ю | Jod | mano |
| 𐤊 | ך כ | K | K | К | Kaf | palmo, kulero |
| 𐤋 𐤋 | ל | L | Λ | Л | Lamed | bovstimulilo |
| 𐤌 | ם מ | M | M | М | Mem | akvo |
| 𐤍 | ן נ | N | N | Н | Nun | fiŝo |
| 𐤎 | ס | — | Ξ | — | Sameĥ | manĝoĉambro |
| 𐤏 | ע | O | O | О Ю | Ajin | okulo |
| 𐤐 | ף פ | — | Π | П | Pe | buŝo |
| 𐤑 | ץ צ | — | — | Ц Ч | Cade | fiŝhoko |
| 𐤒 | ק | Q | (Ϙ) | — | Kof | tenilo |
| 𐤓 | ר | P R | P | Р | Reŝ | kapo |
| 𐤔 | ש | S | Σ | С Ш Щ | Ŝin | dento |
| X + | ת | T | T | Т | Tav | signo |

Unue la homoj desegnis kaj pentris. La unua formo de skribo konsistas el iaj desegnaj rakontoj. Ankoraŭ nun ni ĉiuj uzas tian sistemon por kompletigi niajn priskribojn, eĉ se niaj desegnoj ofte estas tre mallertaj aŭ pli malpli skemecaj. Tiu spontana grafika esprimmaniero per longa evoluo naskis ideografian skribon. Oni disponas pli malpli kontinuan dokumentaron, kiu montras la evoluon de primitiva piktograma al la ideografiaj de la ĉinoj, babelanoj (kojnforma skribo) kaj egiptoj (hieroglifoj). Rimarkinda trajto de tiuj ideografioj estas ilia strikta adapto al unu lingvo. En sia plej frua formo ili jam konsistas el duspecaj signoj: ideografiaj kaj fonetikaj. La fonetikaj signoj evoluis el la ideogramoj, konservante nur la prononcitan nomon de la reprezentita ideo sed forlasante tiun ĉi laŭ principo analoga al tiu de rebusoj. La fonetika sistemo de la egiptaj hieroglifoj konsistas el tri-, du- kaj unusilabaj signoj. En tiu komplika sistemo, rezultanta de longa evoluo, la antikvaj egiptoj disponis plurajn kompletajn alfabetojn en la moderna senco de la vorto. Tiuj alfabetoj estis kaŝitaj inter centoj da heterogenaj signoj uzitaj jen kiel ideogramoj, jen por sia fonetika valoro. Same la elemen-

toj de esperanto ignorate ekzistas dise en la lingvoj de partoprenantoj de mondskalaj internaciaj renkontiĝoj, en kiuj necesa estas la ĉeesto de interpretistoj kaj tradukistoj.

La hieroglifa sistemo, konvencie stabiligita, estis elita skribo de pastroj, la tiamaj teĥnokratoj. La racia kreo de nia alfabeto, poste disvastigita de la fenicanoj, okazis inter la 15-a kaj la 10-a jarcentoj antaŭ Kristo surbaze de la hieroglifoj. Paralele estis uzita dum kelka tempo ankaŭ ekvivalenta alfabeto bazita sur la babela, kojnforma skribo, adaptita al grifelado sur argiltabuletoj. La fenica aŭ hebrea lingvo, kiun la judoj forlasis ekster religia uzo post la babela ekzilo (ĉ. 600 a.K.) por la aramea (ankaŭ tre proksima semida lingvo), estis parolata de afrikaj kamparanoj en la regiono de Kartago ĝis almenaŭ la 3-a aŭ 4-a jarcento post Kristo. La origina fenica alfabeto konsistas el 22 konsonantoj. Same kiel la egiptoj kaj aliaj semidoj, la fenicanoj principe ne skribis la vokalojn, kvankam ili foje uzis kelkajn konsonantojn tiucele. Ankoraŭ en moderna hebrea lingvo kaj en aliaj semidaj lingvoj oni ordinare forlasas la vokalojn, markitajn per diversaj kromsignoj.

La greka vorto por "libro" estas "biblion" (retrovebla en: Biblio, biblioteko, bibliografio ...). Ĝi devenas de la nomo de la fenica urbo Biblo. Ĝia signifo unue estis "papiruso". Antaŭ la adopto de la fenica alfabeto, la grekoj uzis kiel la persoj adaptitan formon de kojnforma skribo pruntita el la babelanoj. Laŭ legendo la fenicano Kadmo, filo de Agenoro, serĉante sian fratinon Eŭropo rabitan de Zeŭso, alportis ĉirkaŭ 1200 a.K. la fenican alfabeton al Grekio, kie li fondis Kadmion, citadelo de Tebo, ĉefurbo de Beotio. La plia genia novaĵo en la adapto de la fenica alfabeto al la greka lingvo estas la sistema uzo de pluraj (precipe gorĝaj) hebreaj konsonantoj kiel vokaloj. Krome la nova alfabeto ricevis diversajn formŝanĝojn kaj aldonojn. La formo ricevita en Granda Grekio (Suditalio) naskis la latinan alfabeton. Rimarkinde, tiu ĉi prezentas hodiaŭ en siaj majuskloj la plej arkaikan formon el ĉiuj modernaj alfabetoj (hebrea, greka, runa, araba, cirila, amhara ...) naskitaj de la fenica alfabeto. La moderna distingo inter majuskloj kaj minuskloj aperas post la invento de la presarto. La minuskloj estas bazitaj sur konscia reformo de mezepoka vario ("karolina") de antikva stilo de la latina alfabeto. La literoj j kaj v, antaŭe konfuzitaj respektive kun i kaj u, aperas en la Renesanco (16-a jarcento).

Ĉirkaŭ la 3-a jarcento post Kristo, kiam la egiptoj alprenis la grekan alfabeton por skribi sian koptan lingvon, ili verŝajne ne konsciis, ke ili tiam nur tion malrekte rericevis, kion iliaj prauloj antaŭe donis. Ŝajnas, ke ili tiam sen bedaŭro forlasis sian pitoreskan sed komplikan kaj maloportunan, eble ankaŭ religie senvalorigitan, hieroglifan skribsistemon. Kun la forlaso je la hieroglifoj perdiĝis pli ol 3000 jaroj da homa historio kaj literaturo. Feliĉe dum ankoraŭ kelka tempo ambaŭ skribsistemoj restis uzataj paralele. Danke al tiu cirkonstanco, Champollion (Ŝampoljon) retrovis en la komenco de la 19-a jarcento la ŝlosilon de la hieroglifoj kaj de la perdita egipta pasinto.

La hebrea alfabeto en sia moderna stilo aperis ne pli frue ol ĉirkaŭ la 4-a jarcento a.K. La araba lingvo estis unue skribita per hebrea alfabeto. La araba alfabeto, elvolvita el la hebrea, aperas ĉirkaŭ la jaro 500 p.K.

Ateno adoptis la miletan (jonian) stilon de la fenica alfabeto per oficiala decido en la jaro 403-a a.K.

La monaĥoj Metodo kaj Konstantino (tiu ĉi estas pli konata sub la nomo Cirilo) kreis en la 9-a jarcento p.K. por la slavoj la cirilan alfabeton surbaze de la greka. El tiu alfabeto tiriĝis poste la moderna rusa alfabeto, kiu ricevis sian lastan, jam antaŭe preparitan reformon post la soveta revolucio de 1918.

La japana lingvo skribiĝas per ĉinaj ideogramoj (kies nombro estas oficiale limigita al 2000) kaj per du paralelaj silabaroj el 50 fonetikaj signoj tiritaj el la ĉinaj ideogramoj, aŭ per unu el la du sistemoj bazitaj sur la latina alfabeto. Ĉiuj junaj japanoj lernas la latinan alfabeton jam en la

elementa lernejo. Fakte la esperanta alfabeto el 28 literoj plej ĝuste kongruas kun la japana fonetiko.

Meznivela kono de la ĉina skriblingvo respondas al ĉirkaŭ 6000 ideogramoj. Plusa peno por lerni la 28 fonetikajn signojn de esperanto: apenaŭ 0,5 %. Ekzistas ankaŭ moderna ĉina alfabeto kreita surbaze de la latina: ĉiu leganto de "El Popola Ĉinio" jam familiariĝis je ĝi. La vjetnama (jam de jarcentoj), malaja, indonezia, polineziaj, madagaskara, suahilia lingvoj skribiĝas per la latina alfabeto. En la moderna mondo la latina alfabeto estas la plej disvastigita el ĉiuj skribsistemoj.

Cetere, ĉiu fonetika aŭ ideograma skribsistemo (interalie stenografio, morsa, surdmuta, brajla alfabetoj) estas adaptebla ankaŭ al esperanto. La skribo estas ja la plej videbla sed tute ne la plej grava trajto de lingvo. Post la invento de la unua alfabeto, facile estis inventi aliajn per imito aŭ sur ŝajne tute aliaj bazoj. Ekzemple, la alfabeto inventita de kristanaj misiistoj por la eskima lingvo, konsistanta el geometriformaj literoj, estas evidente samprincipa kiel la latina. Trajto komuna al ĉiuj alfabetoj estas ilia artefariteco, ilia racikreiteco

23111

---

9 → Vojaĝo al Pollando (daŭrigo) apud la francaj gazetoj l'"Humanité"-n, "Le Figaro", "L'Aurore", kaj aliaj dekstrulaj gazetoj.

18-8-78: Oni vidas verdaĵon ĉie, eĉ en la plej grandaj urboj. Estas aero por spiri, kaj la aŭtomobila cirkulado estas regulata tiel ke ĉiam eblas promeni trankvile eĉ en la centro de la urbo.

Posttagmeze, mi renkontas en la biblioteko Profesoron kun kiu, dank al la traduk-ista helpo de Walter, mi diskutas pri politiko. Li prezentas sin kiel "opoziciulo". Li diras ke li povas esprimiĝi tute libere, sed li bedaŭras ke li havas tre limigitajn eblecojn agi. Li ne estas organizita en Partio. Liaj kritikoj precipe koncernas homojn, kiuj tro profitas sian povon, pli ol ili koncernas socialistan sistemon mem. Kiam li parolas pri la kapitalistaj landoj, li ne subtenas la kapitalismon, sed li neniel fidas la komunistajn partiojn de tiuj landoj. Li kredas, ke se ili havas la povon, ili farus la samajn erarojn kiel ĉi-tie. Li estas tre pesimista, kaj antaŭvidas nenian solvon antaŭ jardekoj. Ŝajnas al mi, ke li ne sufiĉe konsideras la historian situacion de la diversaj landoj, kaj tiel falsas sian politikan analizon. Kiam li kritikas la registaron, li forte insistas sur la temon "liberon", sed kun relativa troigo, kiu permesas manipuladon de liaj diroj fare de primaraj kontraŭ-komunistoj : fakte, kiam oni plu diskutas, li konfesas ke, eĉ se tiu fakto permesas nenion pardoni, la libero ankoraŭ pli mankas Okcidente.

19-8-78: Ni vizitas vilaĝon, kie vivas kampara onklo de Walter. Ni estas varme akceptataj, kaj ĉio ĉi-tie rememorigas al mi la farmon de mia maljuna onklino en Svedio. La vivmaniero estas sama, kaj ankaŭ la gastemo.

20-8-78: Ni vizitas "laboristajn ĝardenojn": sur granda spaco ekster la urbo estas multaj ĝardenoj kiujn prizorgas kaj profitas la urbanaj laboristoj. Tiuj ĝardenoj estas belegaj ! Ĉio kreskas en ili : ĉiaj legomoj kaj floroj ; kaj neniu peco de nigra tero restas senutila.

21-8-78: Vizito de Łańcut, kastelo kaj parko belege prizorgataj : ĝi estas purigata ĉiusemajne, kaj ĉio aspektas kielnova ! La stilo de iuj ĉambroj estas tipe pola. La lignomozaika planko estas rimarkinda. La kaleŝa kolekto estas la 2a en la mondo post tiu de Lisbono : la kaleŝoj kvankam tre malnovaj, estas tiel prizorgataj, ke ili estas funkcipovaj, se ne ĉiuj, certe la plimulto.

Renkonto kaj diskuto kun pianisto kiu afable ludas interalie por mi "La Espero"-n. Vespero kun paro da artistoj-filozofoj, kies ideojn mi ne ĉiam klare sekvas, sed kiuj montriĝas tre interesaj homoj sur siaj fakaj terenoj.

22-8-78: Ni renkontas la vicĉefredaktoron, kaj alian redaktoron de "Prometej" fama loka gazeto de la gejunuloj. Ili jam aperigis artikolojn pri Esperanto, kaj adresojn por korespondado. Fine de longa kaj simpatia diskuto estis decidita interŝanĝo de gazetoj inter "Prometej" kaj "LJP".

23-8-78: Ni promenas en la kamparo ĉirkaŭ Rzeszów. La kamparo komenciĝas tuj ekster la urbo. La unutoneco ne eblas en tiu lando, kie ĉiu kamparano posedas sian pecon de tero kaj sian domon, kiujn li rajtas uzi laŭplaĉe.

La domoj estas sufiĉe tipaj, el ligno aŭ el brikoj. Nun estas por la kamparanoj la plej laborplena periodo : tiu de la grenrikolto. Je preskaŭ ĉiu paŝo, ni renkontas fojnĉaretojn tiritajn de unu aŭ du ĉevaloj, kiuj revenas al la farmdomo. Vespere, ni renkontas denove la onklon de Walter kaj liajn gefilojn, kiuj ankaŭ laboras en la farmo. Ni promenas kaj diskutas amikece. Ili faras multajn demandojn pri mi lando, kaj pri miaj vivkondiĉoj, kaj ankaŭ parolas pri sia kampara vivo. Ili havas multegan laboron. Ili estas fervoraj katolikoj kaj iras preĝi ĉiu-dimanĉe. Ili suferas pro la fakto ke ili ne povas atingi interesajn postenojn, ĉar por tio, oni devas malkonfesi ĉian religion. Ili dezirus pli partopreni en la konstruado de sia lando, en la diskutoj koncernantaj la ekonomiajn decidojn. Ili plendaspro la malfido de la Partio kaj →

Frakcio kontraŭ eksproprii la laboristaron

## 1a DE MAJO : TAGO DE LA LABORISTA KLASO !

Homoj nomis la 1an de Majo "Tago de la laboristaro", por ĉiun 1an de Majo la novanvojon prezenti per propraj partioj kaj sindikatoj en ĉiuj landoj :

" Ne plu eksproprii la laboristaron ! "

Nia nova mondo ne plu eksproprios la laboristojn !! La klaskonsciaj laboristoj forlasis la batalojn kontraŭ homoj, ilia batalilo estis komuna diskutado kun ĉiu pri ĉio ! Ili ekkonis : "Ĉiuj homoj estas bonaj kaj sen kulpo ! " Unuopuloj kaj popoloj dum jarmiloj nur estas malamikoj, ĉar NENIU en la mondo sciis, ke ĉiaj krimoj estas nenio alia ol fruktoj de la eksproprado je la laboristaro per la profitsistemo (la maljusta ekonomio) ! Tiu scio estis la bazo de la Laborista Majo ! Ĝis 1932a !

En tiu jaro la popolo en Germanio balotis novan regnan parlamenton. Estis balotitaj 1/3 (triono) da Parlamentanoj POR, kaj 2/3 (du trionoj) KONTRAU Hitler ! La popolo estis feliĉa pri tiu rezulto, ĉar en Germanio sole la parlamentanoj (neniu alia) rekte en Parlamento balotas la kancelieron, tial per tiu parlamento Hitler neniam povas fariĝi kanceliero ! Opiniis la popolo, ĉar neniu pensis, kio nun okazis ! Tiuj parlamentanoj en 1933 komune (do : tri trionoj), eĉ la Judoj, balotis Hitleron kiel kancelieron !!! (Unuvoĉe !) Li tuj la Tagon de la laborista-klaso nomis : "Tago de la LABORO !" El la Laborista Majo kun la batalilo de la eksproprietuloj al mondpaco, fariĝis la Hitler-Majo kun la bataliloj de la eksproprietantoj al la 2a mondmilito !!!

Sed nun for la Hitler-Majon !!! La unuiĝo de la eksproprietatoj (proletoj) proklamas en 1978a la 1an de Majo kiel ĝi estis antaŭ Hitler ! Kaj kun plej nova eltrovo : "La radiko de la eksproprieto je la laboristoj estas la plialtigoj de la prezoj !!! (Maljusta ekonomio !).

K-do Kotro pravas : "Justa ekonomio estas PACO !". Jen la leĝo de nia frakcio : Ĉion disdoni al la membroj kiel ĝi estas aĉetita, ĉiuj elspezoj estas pagataj per komunaj kotizoj, la disdonantoj ricevas salajron ! Neniam plialtigi la aĉetprezojn ! Tiu leĝo estas la ŝlosilo en pacan mondon !

(SAT-NR 31530)

---

Vojaĝo al Pollando (daŭrigo)
de la oficialaj organoj koncerne la katolikan loĝantaron, kiu, ankaŭ ĝi, same deziras progresigi la ekonomion kaj vivnivelon de Pollando.

24-8-78 : Denove en la kamparo. Dum la longaj diskutoj, mi komprenas ke oni ne kredas min, kiam mi parolas pri la Franca situacio. Oni imagas, ke la vivnivelo porĉiuj en Francio estas tiel alta, ke oni ne bezonas socialismon en la nunaj kapitalismaj landoj. Oni do malfacile komprenas kiel oni povas estis komunisto en Francio, kaj oni iomete primokas min, tamen amikece.

25-8-78: Ryszard Doliński, la prezidanto de la Pola Esperanto Asocio en Rzeszów vizitas min. Ni longe parolas pri la esperanto-movado kaj pri SAT, kaj ni rendevuas por la 3a de Septembro.

Agrabla kaj interesa vespero ĉe pentrista kaj skulptista amiko de Walter.

26-8-78: Ni vojaĝas nokte al Varsovio. Tie ni loĝas ĉe esperantistaj amikoj, en vilaĝo atingebla de la centro de la urbo post 20mn de trajno. La domo estas sufiĉe vasta kaj komforta. Ĝi memorigas mian gepatran hejmon, kvankam iomete pli vasta kaj ko forta.

Unuavizito al Varsovio, la rekonstruita urbo. Mi vidas precipe la novajn kvartalojn, kaj la oficialajn sidejojn. La "domo de la kulturo kaj de la sciencoj", en stalina stilo (1952-55), estas palaco en la rusa maniero, kiu donas al la kvartalo novjorketan aspekton.

Vespere, ni diskutas kun niaj Varsoviaj amikoj pri SAT kaj pri Esperanto.

27-8-78: Ni renkontiĝas kun Jerzy Uśpieński, ĵurnalisto kaj antaŭa prezidanto de Pola Esperanto Asocio. Ni vizitas la malnovan parton de Varsovio. Kia beleco ! Kia homa zorgo kaj kuraĝo ! Kia kulturo konservita kaj disvastigita en tiu urbo ! Bedaŭrinde la suno malofte aperas, sed eĉ sub la vento kaj la pluvo, Varsovio estas belega kaj admirinda.

Ripozante ĉirkaŭ tablo kun kafo kaj ĉokoladkuko, ni diskutas pri la Esperantomovado, kaj pri SAT. Estas miskompreno ĉirkaŭ la vorto "sennacieca", kiun oni konfuzas kun "sennaciismo". Kiam estas klare ke SAT estas sennacieca pro ĝia strukturo, sed ne sennaciisma, ĉar SAT ne estas partipolitika, nek havas oficialan ideologion, li montriĝis favora al la celo de SAT kiel ĝi estas esprimita en ĝia statuto.

(daŭrigota)

DEBATO (daŭrigo)

Ni estu realistaj !

Unue mi volas rimarkigi, ke tiuj, kiuj ne povas akcepti senkondiĉan neperforton estas pli grandaj moralistoj ol ni. En Lektur' oni demandis nin, ĉu pravis la anarkiistoj, kiuj prenis pafilojn kontraŭ la faŝismo. Kaj nun Vemo uzas la vorton "kraĉi al la vizaĝo". Mi rimarkas, ke ambaŭ vortoj apartenas multe pli al la sfero de la moralo, eĉ de la pasio, ol al tiu de la politiko kaj de la realismo.

Se ni estas politike realistaj, ni konstatas ke :

- Hispanio restis faŝista dum 40 jaroj
- en Kambodĝo estas eble pli da murdoj ek de la "liberiĝo" ol dum la tuta milito, kaj tiu lando liberiĝis el la usona imperiismo nur por fariĝi ĉina kolonio. Siaflanke, la vjetnama registaro ne plu estas sklavaro de Usono, ne, nun ĝi estas sklavaro de Sovetio, vere laŭdinda ŝanĝo, ĉu ne ? Kaj eble baldaŭ venos nova milito en Hindoĉino, sed, ĉar ne plu kulpos Usono, oni ne plu demonstros surstrate, oni lasos la hindoĉinojn murdi sin reciproke kiel "liberaj homoj".

Do, almenaŭ en tiuj du ekzemploj, tiuj, kiuj heroe prenis pafilojn por defendi sian liberecon tute ne liberigis siajn popolojn, ili okulfrape fiaskis, tio estas malmorala, sed realista konstato, kaj mi miras, ke oni povas uzi tiel okulfrapajn fiaskojn de la perarmila lukto precize por rebati al neperfortuloj.

Mi malaprobas la tekston de U.P.F. pro tio, ke ĝi ne eliras el la eterna morala diskutaĉo pri praveco aŭ malpraveco de militoj. Kion oni devas demandi pri defendsistemo ne estas, ĉu ĝi pravas (el morala vidpunkto), sed ĉu ĝi efikas (el militstrategia vidpunkto).

Do, Vemo, vi volas efikajn armilojn por vin defendi kontraŭ eventuala agreso. Unua demando : kion vi volas defendi ? Se vi volas defendi "vian liberecon" mi demandas vin, kio donas al franca laboristo de usona multnacia firmao tiel grandan sentimenton de libereco. Se vi volas tutsimple defendi vian haŭton, konsentite tion mi komprenas.

Do la demando estas : kiel defendi efike niajn haŭtojn kontraŭ eventuala agresanto ?

Ni rimarku, ke el niaj eventualaj agresantoj, estas kelkaj potencoj, kiuj posedas atomarmilojn. Do : kio estas la plej efika defendsistemo kontraŭ atomarmiloj ? Jen la demando.

Nun venas la franca registaro, kaj postulas, ke mi pagu impostojn por defendi la Nacion kontraŭ la rusoj (kaj aliaj). Kaj parto de la impostoj, kiujn mi pagis, poste "utilas" por pagi grenadojn al la ŝtatpolicistoj. Ĉu per grenadoj la ŝtatpolicistoj protektas min kontraŭ soveta atombombo ? Do, kion oni protektas kontraŭ kiu ? La respondon donas al ni tre oficiale la registaro : oni protektas nin kontraŭ la "enlanda malamiko". Per aliaj vortoj, oni protektas nin kontraŭ... la francoj ! Grenadoj ne utilas kontraŭ la rusoj, sed ili bone efikas kontraŭ francaj ekilogiistoj (interalie).

Tio estas nur parentezo. Kompreneble, Vemo, vi estas sincera, vi volas protekti vian haŭton kontraŭ usonaj, sovetaj, ĉinaj kaj aliaj atombomboj. Mi nur volas rimarkigi, en la kadro de tiu-ĉi debato, ke aliaj estas malpli sinceraj, kaj volas armilojn ĉefe por defendi siajn proprajn deputitajn fotelojn kontraŭ enlandanoj. Tion ne diras mi, tion jes ja diras ili mem. Tio estas parto de la debato, kion ni ne povas flankenlasi.

Sed ni revenu al la sinceruloj. Do vi volas protekti vian haŭton kontraŭ atombomboj. Efike, kompreneble !

Al tio la franca registaro respondas al ni tre serioze, ke ĝi ne konstruigas ŝirmejojn por la kazo de atako de la franca popolo, ĉar tia konstruado malgrandigus la kredeblecon de nia propra atoma defendo. Aŭ oni havas atombombon, aŭ oni havas ŝirmejojn por la popolo, sed ne ambaŭ. Nun mi komprenas, kial Kartezio ne povis publikigi siajn verkojn en sia propra lando !

Do, ĉar mi ne povas havi atomŝirmejojn precize pro tio, ke ni havas atombombojn, kion ni faros okaze de atoma atako ? Ni ja ne povos uzi la grenadojn de la ŝtatpolico, estas tro klare, ke tio ne efikus. Kio efikas kontraŭ atombombo ?

Stultuloj respondas aŭtomate : pli forta atombombo. Fakte, la rezulto estos : O kontraŭ O, ambaŭ la agresantoj kaj ni pereos. Kompreneble, ni mortos prave, heroe kaj venĝite, tio estas ja konsolo por mortontoj, ĉu ne ? (mi respondas : ne !).

Trankviliĝu, niaj geniaj strategiistoj bone scias tion, kaj doktorece respondas al ni, ke ni komprenis nenion : atombombo ne utilas pro tio, ke ĝin oni uzos, sed nur pro tio, ke la malamiko firme kredas, ke ĝin oni uzos. Do, karaj legantoj de LJP :

- se vi estas francaj : inter ni, karaj samnacianoj, niaj atomarmiloj neniam uziĝos, tio estas tute certa, dormu sur viaj du oreloj,

- se vi estas rusaj : tremegu, fibolŝevistoj, se vi aŭdacos ataki nin pacemulojn ni respondos al vi per teruregaj armiloj (almenaŭ dekoble malpli fortaj ol la rusaj, cetere),
- se vi estas nek francaj, nek rusaj : ludu per monero, sed, se vi perdas la ludon, vi pereos kun ni.

Fakte, tute certas ke, se Hitler havus atomarmilojn, ilin li uzus kaj naziismo venkus sur la tuta planedo. Nu : ĉu ne plu estas nazioj en la mondo ? ĉu estas neimageble, ke unu el ili iam alprenos la potencon ?

Do, laŭ mia kompreno, la demando pri malarmiĝo metiĝas tiel :

. per kiaj armiloj Usono kaj Sovetio povas defendi sin unu kontraŭ la alia sen eksplodigi la tutan planedon ?

. ĉu Liechtenstein devas armi sian ĝendarmaron por defendi sin kontraŭ eventuala agreso far Cinio ?

Kiu kapablas respondi inteligente la unuan demandon gajnas mian tujan aĉeton de sia tuta verkaro. Kiu kapablas respondi inteligente a la dua demando gajnas belegan funelon.

Mi ne estas pli inteligenta ol aliaj : mi tute ne scias, kiel oni protektas sin efike kontraŭ atomarmiloj, nek cetere kontraŭ meteorologiaj, bakteriaj , sismaj kaj aliaj armiloj, pri kiuj laboras sekrete la pormilita esploro. Mia persona opinio estas ke, kontraŭ tiaj armiloj, maŝinpafiloj, eĉ modernegaj, do multekostaj, utilas ekzakte tiom, kiom nudaj manoj. Car mi estas iom avara, mi preferas do, ke oni ne aĉetu la modernegajn maŝinpafilojn, kaj prefere dediĉu la monon al malsanulejoj (ne psikiatriaj !), infanvartejon (ne kazernsimilaj!) hejmoj por maljunuloj, ktp... Ni almenaŭ pli bone ĝuos la vivon ĝis la atako !

Gis iu genio respondos mian unuan demandon : kiel lukti efike kontraŭ atombombo sen sin mem mortigi, kaj la aliajn kune, mi pensas, ke ni nepre ne povas permesi al ni trian mondmiliton.

Do, kara Vemo, ĉar vi prave volas defendi vian haŭton, la demando estas · kiel malebligi, ke okazu nova mondmilito ? Tiu demando estas la bazo de pacismo. La bazo de militismo estas: kiel plej efike mortigi sian malamikon ? Vi ja diris al mi, ke vi zorgas pli pri via propra haŭto ol pri la kadavro de via malamiko. Do : kiel alveni al ĝenerala malarmiĝo, kio malebligos ĉian militon ?

La demandon oni metis jam en 1918, kaj ŝajnas al mi, ke oni ne tre bone respondis ĝin, ĉu ? Fakte, oni multe parolas pri ĝi ek de multaj jaroj, kaj dum tiuj multaj jaroj senĉese multiĝis kaj plidanĝeriĝis la armiloj. Prezidento Giscard d'Estaing tre bele parolis pri ĝenerala malarmiĝo ĉe UNO. Kaj, tuj reveninte, li plialtigis la buĝeton de la armeoj, cetere sen ia ajn protesto de la opoziciaj partioj, kiel kutime.

Do oni devas trovi ion alian antaŭ ol UNO montros sin tiom efika kiom la Societo de Nacioj. Kial ne unuflanka malarmiĝo ? Tuja reago : tro danĝere, resti kun nudaj manoj kontraŭ atombombo, tio ne estas realista. Sed diru al mi : kio estas pli danĝera por mi francino :

- ke ĉiuj francoj mortu murdante ĉiujn rusojn ?
- ke ĉiuj francoj mortu sen murdi iun ajn ?

Car mi estas fie malmorala, mi pensas egoiste, ke tio neniel ŝanĝas la sorton de mia persona, tiom ŝatata, haŭto, kiu ja estas la kerno de nia debato, ĉu ne ? Sed komprenebIe, tia aserto estas tute malrealista, kaj ĝin mi esprimas nur pro tio, ke mi estas skizofrenia.

Se la vetarmado daŭras, iam tiu tute terura alternativo metiĝos. Mia problemo ne estas, kion elekti inter du ebloj, kiuj ambaŭ kondukas min al certa morto. Mia problemo estas, kiel fari, por ke la terura alternativo neniam realiĝu. Kiel fari, por ke ĉiuj potencoj rezignu pri siaj armiloj, nura maniero por certigi la pacon ? Jen la nura inteligenta demando, kiun povas meti homo, kiu deziras antaŭ ĉio savi sian haŭton. Ke komencu iu el ili ŝajnas al mi logika respondo. Aŭ ĉu genio trovis ion pli efikan ???

Jacqueline LEPEIX

---

LIGO POR LA UNUFLANKA MALARMADO DE ITALIO

El niaj italaj kamaradoj ni ricevis broŝureton de Carlo Cassola pri la "militista socio". Tiu broŝuro estas tre interesa, pro tio, ke la proponon pri unuflanka malarmado ĝi studas, ne el morala, sed el socia kaj politika vidpunkto. Jen la referencoj de tiu broŝuro por la gekamaradoj, kiuj scipovas legi la italan :

La società militarista, Carlo Cassola, Firenze, Casa editrice Leo S. Olschki , 1978 .- (Belfabor). Jen kelkaj eltiraĵoj el tiu verko :

La militista socio

"Mi konsideras la kontraŭmilitismon kiel celon, ne kiel rimedon, kaj kiel celon mi intencas ĝin esplori. Estas homoj, kiuj konsideras la kontraŭmilitismon nur kiel momenton en pli vasta lukto. Tio estas eraro : la militismo estas la baza strukturo, la ŝlosilstrukuro de la tuta socio. Male de esti iu efiko aŭ fenomeno de io alia, ĝi estas la kondiĉo kaj la motivo de la tuta disvolvo de la socio. Tial la nuna socio, pli ol kapitalista aŭ komunista, devus esti nomata per la ĉefa karakterizaĵo, kiu cetere estas tre videbla : la militismo.(...)"

"Cirkulas jam la dirmaniero : la kazerna ŝtato, kiu spegulas tiun ideon : se oni bone komprenas, estas la kazerno, kiu stampas la ŝtaton, kaj ne male. Tio devus esti okul-frapa, se oni pensas, ke la ŝtatoj estis diversformaj, dum la militismo ĉiam ekzistis, kaj ĉiam estis egala de si mem. Veras, ke ĉiam ekzistis la ekspluatado, sed ŝanĝiĝis ĝia formo : la ekspluatado de la salajrricevantoj estas malsama de tiu de la servutulo ligita al la grundo, aŭ de tiu de la sklavo. La granda komuna problemo estas : kontraŭ kiu direk-ti niajn klopodojn, kontraŭ la ekspluatado aŭ kontraŭ la militismo ? Kontraŭ la Stato aŭ kontraŭ la kazerno.(...)

Estas la kazerno, kiu donas sian propran stampon al la cetera socio. La lernejo estas ordonema, la familio punema, la industria produkto estas bazita sur la uzina disciplino, la partioj estas strukturataj hierarkie, sed vane estas plori pri tiuj malbonoj kaj es-peri ke oni povus kuraci tion, se oni ne detruus la militismon. Kio estas fakte la ordon-emo, la punemo, la disciplino, la hierarkio, se ne militistaj konceptoj transpasintaj al la civila socio ? Tiom longe, kiom apud la civila socio ekzistos la militista socio, la unua imitos la duan. Tio estas neevitebla."

<u>La unuflanka malarmado de Italio</u>

"La nura maniero por savi la mondon, estas realigi la malarmadon hejme, kun la espero, ke ni estos imitataj sufiĉe frue de la aliaj landoj, kaj aparte de ambaŭ superpotencoj.

Tio estas nur espero, tio ne estas certo. Certa estas tamen, ke sen armiloj nia lando ne nur estos multe pli prospera kaj multe pli civila, sed ankaŭ multe pli sekura. Kaj certas, ke kun tempo la vido de popolo sen armiloj kaj tamen prospera, civila kaj sekura, estos nerezistebla ekzemplo por la cetera mondo.

Nia esta lukto kontraŭ la tempo. Kion fari por savi la mondon ? Ni havas malmulte da tempo disponebla, ni esperu, ke ĝi sufiĉos.

La mondo povas salti al la aero ankaŭ morgaŭ. Se ni estas optimistaj, ĝi povas vivi ankoraŭ dum 30 jaroj. Post 2010 estas neimagebla la postvivo de la homaro sur la tera planedo.

Kial ? Car la katastrofaj elementoj, pri kiu ni disponas, kun vido de la historio,kiu devenas de la jarcento de la lumoj, sed estas sugestata ankaŭ de la nura sana kompreneblo, kia ĉiuj povas ĝin vidi, bedaŭrinde ne lasas al ni multajn iluziojn. Laŭ la filozofoj de la lumo la ĉefa motoro de la historio estas la nescio, t.e. la nekonscio, la blindeco, la stulteco, la antaŭjuĝoj, la dormo de la racio. Tio estas konstato amara, sed vera. Kia ajn estas la periodo de la historio, kiun oni volas konsideri, oni vidas, ke la plimulto ne sciis, kio estis falota sur sian kapon. Se tiu blindeco veras en la pasinto, kial ne ankaŭ en la nuntempo ? Se niaj antaŭvenintoj estis malprudentaj, kial ni mem devus same esti ? Hodiaŭ minacas nin malbono senfine pli danĝera ol tiuj de la pasinto : la fino de la mondo. La nura fakto, ke ni ne akordiĝas, ke ni faras nenion por ĝin eviti, montras, kiom kulpaj ni estas.

La katastrofaj elementoj, pri kiuj ni disponas estas : 1) la mondo estas dividita en 156 ŝtatoj, kaj ilia nombro emas pligrandiĝi, ĉar neniu grava politika forto oponas kontraŭ tiu plimultiĝo ; 2) krom tre malgrandaj ŝtatoj kiel Costarica, Islando kaj Seychelles, la aliaj ĉiuj estas militistaj socioj, kaj intencas esti eble plej rapide atomaj potencoj. La infera logiko, kiu nun estras la disvolvon de la homaj aferoj kaj kiun kontraŭbatalas neniu grava potenco, fakte ne videbligas alternativon al la politiko de potenco ; 3) La scienco de la detruo ne restas senmova. Dum tiuj 32 jaroj, ĝi bedaŭrinde antaŭeniris per paŝoj de giganto. La plej grandaj atombomboj nuntempe estas milope pli potencaj, k.e. milope pli detruaj, ol tiu, kiu detruis Hiroŝimon. Supozante saman disvolvon de la detruaj potencoj dum la venontaj 30 jaroj, ni havos en 2010 (se ni ankoraŭ vivos) jenan panoramon : pli ol 156 suverenaj ŝtatoj, preskaŭ ĉiam kun atoma potenco, kapablaj havigi al si bombon milope pli detrua ol la nunaj bomboj, tio estas, milione pli detrua ol tiu de Hiroŝimo. Jen la limsituacio, al kiu ni iras, sed probable la mondo saltos al la aero antaŭ ol ni povos atingi tiun situacion."

(Carlo Cassola)

# POR SENNACIECA EKONOMIO

La Abundana Frakcio daŭre ekzistas kvankam ne ofte aperas pri ĝi.

Mi ne partoprenos la kongreson en Swanwick, sed se iu kamarad(in)o favora al, kaj dokumentita pri la Disdona Socialismo, havas eblecon organizi kunvenon, mi tre ĝojus. Povas esti ĉu Bellamy-ano, ĉu membro de la Socialista Partio de Granda Britio (Monda Socialismo), ĉu membro de la Movado Franca por Abundeco.

En Francio mi konstatas, ke pli kaj pli aperas artikoloj, broŝuroj, libroj pri tiu ekonomio, ĉar pli kaj pli evidentiĝas ke la nuna profitekonomio kapitalisma (ĉu privata, ĉu ŝtata) montriĝas senpova kontraŭ la nuntempa krizo.

Senlaboreco kreskas kaj memkompreneble kreskos pro la senhalta anstataŭigo de nombraj laboristoj, oficistoj per maŝinoj, komputeroj; aŭtomatigado, elektronigado triumfas de la malnova principo: perlabori sian panon estas la homdestino. Tiu progreso - venko de la homo - estiĝas malfavora pro kreo de senlaboreco (aŭ sklavigo al la maŝino por la "laborfavorataj").

La titolo, kiun J. Duboin la fondinto de M.F.A. alprenis en 1934 por sia gazeto "La granda anstataŭigo de la homoj fare de la scienco" fariĝas ĉiutage iom pli aktualatestaĵo. Paralele al senlaboreco kaj pligravigante ĝin, inflacio malgrandigas aĉetpovon jam ne sufiĉa ĉe la plimulto: malaltsalajrulo j, senlaborulo j, emeritoj. Ĉar la maŝino produktas abunde kaj malaltkoste, eblas havigi al ĉiuj normalajn vivkondiĉojn pere de Socia Rento, eblas ankaŭ funkciigi la socion (produktado, disdonado, servoj) per malmulte da laborhoroj fare de la fizike kaj intelekte kapablulo j, eblas fine eviti la malbonojn de la profito ĉar la Socia Rento - kiu alportos en la evoluintaj landoj komfortan facilecon - ne estos ŝparebla kaj nuliĝos se ne komplete elspezita post unu jaro aŭ du. La libera tempo estos uzata por spiritkulturado, interhelpo, artoj, vojaĝoj, ktp, laŭ la kapableco, la prefero, la emo. Tiuj liberaj okupoj alportos vivĝojon ĉar senstreĉaj post mallonga labordeĵorado.

Kompreneble laŭ la aŭtoroj estas prezentitaj diversaj tre variaj demandoj: ĉu labori po du horoj tage? aŭ esti libera dum unu kompleta jaro post kvinjara deĵorado? ĉu en transira periodo pagi Socian Renton pli altan al tiuj, kiuj havas gravan respondecon? aŭ dispartigi la tuton de la produkto egale inter ĉiuj?

Tiu socialisma egaleco ekstartas de bazaj unuoj, entenas elekton de respondeculoj kontrolataj ĉu izolaj, ĉu en komitatoj; komunan elekton de la produktaĵoj necesaj aŭ formetindaj; interŝanĝon inter la landaj regionoj, inter la landoj, unuvorte alvenon al monda organizo, kiu ne celante monprofiton por nur kelkiuj devus jaron post jaro alporti iom pli da necesaĵoj al frathomoj el ĉiuj mondpartoj : for la racismon, la militismon, la naciismon, la profitsistemon; al SENNACIISMO pere de DISDONA SOCIALISMO.

A. NAUDE

Mi sendas broŝurojn al tiuj kiuj deziras dokumentadon: vidu en LJP n-ro 123 kaj Sennaciulo n-ro 6 (877) junio 1978.

K O M U N I K O

pri la interparoloj SAT-Junulfako kaj PSEK

1. Laŭ la invito de Pola Studenta Esperanto-Komitato de Socialisma Asocio de Polaj Studentoj partoprenis la 3-an seminarion "Esperanto serve al la junularo" - /28.II. - 4.III.1979, Uniejów/ - reprezentanto de SAT-Junulfako.
2. Dum la seminario okazis interparoloj kiujn partoprenis:
   -flanke de SAT-Junulfako: Anne-Sophie Lévy /gvidantino/
   -flanke de PSEK/SAPS: Tadeusz Ejsmont /prezidanto de PSEK/, Jerzy Leyk, Ryszard Rokicki.
3. La Junulfako de Sennacieca Asocio Tutmonda funkcias enkadre de SAT, kiu celas utiligi esperanton por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, kaj kunigas la SAT-junularon por specifa agado en la junularaj medioj.
4. Pola Studenta Esperanto-Komitato de Socialisma Asocio de Polaj Studentoj estas soci-scienca movado grupiganta studentojn kaj junajn sciencistojn. Ĝi celas science esplori fenomenojn de internacia lingva komunikado inkluzive esperanton kaj praktike utiligi la lingvon en internaciaj kontaktoj de pola studentaro.
5. Estis interkonsentitaj jenaj formoj de kunlaboro inter SAT-Junulfako kaj PSEK:
   a- regula interŝanĝo de esperantlingvaj informmaterialoj, gazetoj kaj eldonaĵoj,
   b- interŝanĝo de reprezentantoj de ambaŭ organizaĵoj al internaciaj seminarioj aŭ kunvenoj,
   c- aperigado en "La Juna Penso" de materialoj preparitaj far polaj studentoj,
   d- enkonduko de diskuto pri la temo "eduko por la paco" en la gazeto "La Juna Penso",
   e- prepara de informmaterialoj pri SAT en la pola lingvo por prezento inter polaj studentoj.
6. Ambaŭ organizaĵoj pozitive pritaksas la ĝisnunajn kontaktojn kaj esperas ilian pliriĉigon en la estonteco por la realigo de la idealoj de la progresema junularo en la mondo.

Prezidanto de PSEK
Tadeusz Ejsmont

Por la Junulfaka Komitato
Anne-Sophie Lévy

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

KANTANTE, LUDANTE, LERNANTE:
KONCIZA RAPORTO EL LA JUNULKUNVENO EN RÖSJÖ APUD STOCKHOLM

De la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1979 oni aŭdis kantojn zumantajn tra la aero ĉirkaŭ la lago Rösjö apud Stockholm. Tio estis la voĉoj de dek ok junaj esperantistoj, kiuj partoprenis en la junulkunveno de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. La humoro ĉiam estis bonakaj ni ofte kantis. Jes, ni rimarkis ke kanti estas bona metodo lerni lingvon. Oni relegas la saman tekston multajn fojojn kaj per tio oni lernas novajn vortojn.

Ni kursis dum ĉirkaŭ unu horo kaj duono tage. Ni dividiĝis en du niveloj. Unu por novuloj kaj la alia por lernintaj.

Ni tre multe ludis, kaj pantomiman kaj desegnan kaj vortmozaikan ludon.

La manĝon ni mem kuiris. Tio estis ĝojiga laboro, ĉar la rezultoj ĉiam estis bonaj. Du el la ĉeestantoj havis datrevenon en la kunveno. Tio signifas multe da torto...

La 1-an de majo ni iris al Stockholm por disdoni flugfoliojn al la manifestantoj. Ni disdonis ĉirkaŭ 6000 foliojn kaj ĵurnalisto el la loka radiostacio de Stockholm kaptis unu disdonanton kaj intervjuis ŝin radie.

La kunveno estis tre amuza afero. Ĝi estas nepre ripetenda.

Leif Gunnar Karlsson (SEJU)

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

<u>DIALOGO</u> Ĉu vi povus diri ion? -- Jes. -- Do diru ion! --Ion. (Nepluŝciaski)

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Directeur de la Publication: Baudé. Imprimeur: Lévy, 67, av. Gambetta, 75020, PARIS.